

# LA ONDO de Esperanto

*Internacia sendependa magazino en Esperanto*

Esperanto-Kulturpremio  
por Floréal Martorell  
Jubilea semajno de  
turismo kaj kulturo en  
Katalunio

Ponto “Esperanto” kaj  
hotelo “Esperanto” en  
Pollando

Martin Schäffer  
respondas

Sergio Pokrovskij pri  
Ruriko kaj liaj fratoj

Mark Zamenhof: novaj  
dokumentoj kaj enigmoj

Nia trezoro: Mao Zifu

Esperanto-albumo de la  
fama okcitana kantisto  
Patric



2012

12

# LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2012. №12 (218)

**Aperas** ĉiumonate

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov

**Refondita** en 1991

**Eldonas kaj administras** Halina Gorecka

**Redaktas** Aleksander Korĵenkov

**Konstantaj kunlaborantoj** Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajev, Sergio Pokrovskij, Serge Sire, Andrzej Sochacki

**Adreso** RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

**Telefona** (4012) 656033

**Elektronika poŝto** [sezonoj@kanet.ru](mailto:sezonoj@kanet.ru)

**Hejmpaĝo** <http://Esperanto.Org/Ondo>

**Abontarifo por 2013**

*Internacia tarifo:* 38 eŭroj

*Orienteŭropa tarifo:* 20 eŭroj

*Ruslanda tarifo:* 590 rubloj

*Pollanda tarifo:* 60 zlotoj

*Aerpoŝta aldono:* 5 eŭroj

*Elektronika abono (pdf):* 12 eŭroj por ĉiuj landoj

**Perantoj** vidu la liston sur la 23a paĝo.

**Konto ĉe UEA** avko-u

**Recenzoj** Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

**Eldonkvanto** 600 ekzempleroj

**Anonctarifo**

*Plena paĝo:* 100 EUR (3000 rubloj)

*Duona paĝo:* 60 EUR (1800 rubloj)

*Kvarona paĝo:* 35 EUR (1000 rubloj)

*Okona paĝo:* 20 EUR (600 rubloj)

*Malpligrandaj:* 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm<sup>2</sup>

Kovrilpaĝa anonco kosta duoble. Triona rabato pro ripetito.

**Donacoj** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto "avko-u" ĉe UEA.

**Represoj** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2012.

"La Ondo de Esperanto" (Волна эсперанто). 2012, №12 (218).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 18 ноября 2012 г.

Цена свободная. Тираж: 600 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

## Redakcie

**R**igardo el la fenestro de nia redakcio al la senfo-  
lliĝintaj arboj pruvas, ke baldaŭ ekvintriĝos en la  
norda hemisfero. Tio signifas, interalie, ke ĉi tiu kajero de  
*La Ondo*, estas la lasta en ĉi tiu jaro. Kaj en la lasta redak-  
cia kolumno, mi (mis)uzas mian redaktoran rajton por  
iomete halti kaj retrorigardi al la baldaŭ finiĝonta 2012a  
jaro.

Kia ĝi estis por ni? Nu, ĝi estis pli trankvila ol la jaro  
2011a, kiun ni preskaŭ plene pasigis en Moskvo, mal-  
proksime de la hejmo, ŝanceliĝante inter timoj kaj espe-  
roj... Sed *trankvila* nur rimas kun *facila*, — tia ĝi ne estis.  
Ekzemple, Halina dum la unua postoperacia jaro devis  
ĉiumonate viziti Moskvon por konsulti fakulojn, kiuj  
mankas en provinco. Pro tiuj vojaĝoj, pro neprokrasteblaj  
riparlaboroj en la hejmo, kaj pro aliaj urĝaĵoj ni rapide  
komprenis, ke ni apenaŭ sukcesos plene reveni al la  
multflanka agado, kiun ni efektivigis ĝis novembro 2006,  
kiam pro sankialoj ĝi estis grave reduktita.

Do, ni devis elekti agad-prioritatojn, kaj ni decidis, ke  
plej grava estas *La Ondo de Esperanto*. Al ĝi ni donis  
niajn tempon kaj fortojn. Kaj, ĉar multaj el vi skribis (kaj  
diris) al ni pri sia kontenteco rilate al nia gazeto, ni espe-  
ras, ke nia ĉefa tasko estis kontentige plenumita. Ni dili-  
gente daŭrigos ankaŭ venont-jare, kaj jam en januaro vi  
vidos kelkajn novaĵojn (la unuan vi rimarkos en ĉi tiu  
paĝo, kiu ne havos redakciajn komentariojn, sed ... nu, vi  
mem vidos, kio aperos ĉi-kolumne post unu monato).

La dua prioritato estis donita al la reto. Nia novaĵretejo  
*La Balta Ondo* preskaŭ ĉiutage (escepte de la semajnoj,  
kiujn ni pasigis eksterhejme — en sanatorioj, en niaj  
naskiĝurboj... — kaj lacigaj tagoj dum kiuj ni de la 9a  
matene ĝis la 3a postnoktomeze estis okupegataj pri la  
redaktado de *La Ondo*) proponis novan tekston; pligrand-  
iĝis nia ĉeesto en la sociaj retoj; ampleksiĝis (kvankam  
malpli ol ni deziris) nia kolekto de senpagaj e-libroj;  
ekfunkciis nia eta ruslingva informretejo...

La ceteraj agadoj stagnis. Sed nun ni ĝojas anonci, ke  
post kelkaj monatoj kadre de la libroserio *Mondliteraturo*  
aperos du novaj libroj de *Sezonoj: Aventuroj de Ŝerloko*  
*Holms* de Arthur Conan Doyle kaj *Voĉleganto* de Ber-  
nhard Schlink. Kaj antaŭ la jarfino aŭdiĝos nova sonpro-  
gramo de *Radio Esperanto*.

Fine de septembro, post dujara foresto, ni finfine re-  
aperis en Esperantujo (en Arkones) kaj venont-jare ni  
planas veni ne nur al nia ŝatata Arkones, sed ankaŭ al  
BET en Litovio, kaj al UK en Rejkjaviko.

Ĝis revido en Arkones, BET kaj UK! Ĝis reaŭdo en  
*Radio Esperanto*! Ĝis novaj rerenkontiĝoj en *La Ondo*  
kaj en la reto!

**Aleksander Korĵenkov**

**Sur la kovropaĝo** inter Wolf-Dietrich Fehrenbacher (urb-  
estro de Aalen), kaj Françoise Eriksen staras nia konstanta  
kunlaboranto Floréal Martorell, ĵus ricevinta la Esperanto-  
Kulturpremion de Aalen por 2012. Ni gratulas lin! (*Fotis*  
*Inge Simon*)

# Esperanto-Kulturpremio 2012 por Floréal Martorell



Aalen. De maldekstre dekstren: Karl Heinz Schaeffer, Wolf-Dietrich Fehrenbacher, Floréal Martorell, Françoise Eriksen, Gunnar Fischer, Rainer Kurz, Utho Maier (*Fotis Inge Simon*)

**Aalen. La FAME-fondaĵo por stimulado de internaciaj kompreniloj aljuĝis sian 13-an kulturpremion al la konata Esperanto-muzikisto kaj -eldonisto Floréal Martorell el Tuluzo. Tiel oni aprezi la 24-jarajn meritojn de Flo por la kulturo kaj muziko en la lingvo internacia Esperanto.**

La Urbestro de Aalen, Wolf-Dietrich Fehrenbacher, bonvenigis la gastojn kaj alte taksis la gravecon de la muzikkulturo en Esperanto pro ĝia herolda efiko de la internacia idearo, kiun flegas la esperantistoj. Dum la festa matineo en la urba biblioteko Gunnar Fischer, la konata DĴ Kunar kaj GEA-komisiito por moderna Esperanto-muziko, profunde parolis pri la grava rolo de muziko por la movado kaj speciale ties junularo kaj elokvente sukcesis montri, kial ĝuste Flo indas ricevi tiun kulturpremion de la FAME-fondaĵo.

En Esperanto, tute kontraŭe al la aliaj kulturoj, la lingvo kaj ties uzantaro evoluiĝis sur skriba, ne buŝe parolita, bazo kaj propra Esperantokulturo ekestis nur poste: el la identeco de la aplikantoj, kiuj uzis la lingvon en ĉiu ajn kampo. Post longa “periodo de popolkantoj”, en la 70aj jaroj de la antaŭa jarcento kreiĝis pli kaj pli da populara muziko, kaj en la 80-aj jaroj ankaŭ la rokmuziko venis al Esperantujo.

Kaj ĝuste tiun evoluon grave akcelis kaj ebligis la franco Floréal Martorell, kiu en 1987, la jubilea jaro de Esperanto, komencis lerni ĝin. kaj tre baldaŭ komencis evoluigi asocion por Esperanto-rokmuziko, kiu fondiĝis en 1988 sub la nomo kaj etikedo EUROKKA. Du jarojn poste li fondis propran eldon-firmaon *Vinilkosmo* en la vilaĝo Donneville ĉe Tuluzo, kiu tuj avancis al centra rolulo en la merkato pri moderna Esperanto-muziko.

Kial la muziko tiel gravas en la Esperanto-kulturo, la laŭdanto tre bele ilustris: muziko ebligas komunan travivaĵon aŭskultante, ĉu sole ĉu komune, dancante, kantante; ĝi instigas al aktivado, videbligas emociojn, por ke eksteruloj povu kapti la sentitan etoson.

*Vinilkosmo* prizorgas la Esperanto-muzikon en ĉiuj fazoj de ĝia ekesto: ekipado, provludado kaj sonregistrado de grupoj; produktado de kompaktdiskoj; surmerkatigo de la eldonaĵoj. Ek de 2001 oni eĉ disponas pri propra studio. La revuo *Rok-Gazet*, kies 11 eldonoj aperis ĝis 2003, iĝis la plej grava periodaĵo pri la moderna Esperanto-muziko kaj trovis legantojn en pli ol 80 landoj.

Se oni celas skizi la amplekson de la vivoverko de Flo, oni rigardu en la katalogon de *Vinilkosmo*: en ĝi listiĝas 45 propraj produktaĵoj kaj -eldonaĵoj de *Vinilkosmo*, kaj entute 114 kompaktdisk-titoloj (intertempe aperis plia: do jam 46/115). Ke ĉio ĉi ne eblis sen giganta persona engaĝiĝo, tio estas fakto evidenta; ke liaj dankvortoj donas preskaŭ senfinan liston de kunlaborantoj, tio nur substrekas lian personan modestecon.

Kortuŝis, precipe la Germanajn gastojn, la dankvortoj de Floréal, kiu komencis: “Por mi estas emocie, veni ĉi tien kiel amika gasto en frateca etoso...” La sorto de lia familio estas ligita al Germanujo, ĉar dum la dua mondmilito, la patro de lia patrino, hispana respublikano, kiu troviĝis en franca internigejo por hispanaj rifuĝintoj, estis forportita de la nazioj en la koncentrejon Mauthausen kaj pereis tie.

Estas do ne mirinde, ke la tuta muzika laboro de Flo en EUROKKA kaj *Vinilkosmo* por la Esperantokulturo rekte celas (tion li mem eksplikis en siaj dankvortoj) al interkompreniĝo, unuiĝo kaj paco inter la popoloj en la tuta mondo.

Tial la FAME-fondaĵo kaj la urbo Aalen solene distingis la muzikiston Floréal Martorell per la 13a Esperanto-Kulturpremio de Aalen, kio estas ligita al monpremio de tri mil eŭroj.

**Utho Maier**

## Laŭreatoj de la Esperanto-Kulturpremio

- 1991 Claude Gacond kaj Itô Kanzi (2 premioj)
- 1992 Richard Schulz kaj Bruno Vogelmann (2 premiitoj)
- 1994 *Heroldo de Esperanto* kaj Spomenka Štimec (2 premiitoj)
- 1996 Gersi Alfredo Bays (eldonejo *Fonto*)
- 1998 Marjorie Boulton
- 2000 William Auld
- 2002 ADORU (Adolf Burkhardt, Bernhard Eichkorn, Albrecht Kronenberger)
- 2004 Muzikgrupo *Kajto*
- 2006 Interkultura Centro Herzberg
- 2008 Internacia Esperanto-Instituto
- 2010 Halina Gorecka kaj Aleksander Korjenkov
- 2012 Floréal Martorell



## UEA invitas prelegi en Rejkjaviko

Dum la 98a UK en Rejkjaviko okazos la 64a sesio de Internacia Kongresa Universitato. UEA invitas universitatajn profesorojn, docentojn kaj personojn kun simila kvalifiko sendi proponojn de prelegoj al la sekretario de IKU, prof. Amri Wandel (PK 767, IL-71799 Makabim, Modiin, Israelo; rete [amri@huji.ac.il](mailto:amri@huji.ac.il)) ĝis la 31a de januaro 2013.

Lige kun IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kunlabore kun UEA. Proponantoj de IKU-prelego povas samtempe proponi AIS-kurson, kies unua prelego estos parto de IKU, kaj kiu aldone havos du daŭrigajn prelegojn.

La prelegoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la proponanto (kune ne pli ol unu paĝo).

GK UEA

## Pri verda naturo en verda lingvo

**(Landa Agado)** De la 6a ĝis la 9a de oktobro 2012 okazis la 99a Japana Esperanto-Kongreso en Sapporo, la ĉefurbo de la gubernio Hokkajdo. Al ĝi aliĝis 360 personoj, dum el ili 202 efektive vizitis ĉi tiun kongreson. Inter la aliĝintoj estis 26 el aliaj landoj, el kiuj 19 vizitis la kongreson.

La Kongreso havis la temon “Ni interparolu pri verda naturo en verda lingvo!”, kie la verda lingvo evidente estas Esperanto, dum la “verda naturo” simbolas kaj la naturplanan regionon Hokkajdo, kaj la klopodon gardi tiun verdecan naturmedion.

La kongreso estis kunorganizita de Japana Esperanto-Instituto, Hokkajda Esperanto-Ligo kaj de Sapporo-Esperanto-Societo, kaj aŭspiciita de 21 instancoj publikaj aŭ amaskomunikilaj.

Sibayama Zyun'iti

## Ĉielarko de lingvoj

La 10-11an de novembro en Odeso (Ukrainio) okazis la sesa Lingva Festivalo *Ĉielarko de lingvoj*. Ĝia iniciatinto estis Odesa junulara Esperanto-klubo *Verdaĵo*. La celo de la Festivalo estis prezenti samvalorecon de ĉiuj lingvoj de la mondo, montri vastan buntan diverscon de ili, dum ĉiu estas siaspece eminenta kaj esprimas neforigeblan parton de la komuna spirita riĉeco de la homaro.

Ĉi-jare la *lingva ĉielarko* estis aparte multkolora. Estis prezentitaj 31 lingvoj. Ĉiuj lingvoj (krom Esperanto kaj latino) estis prezentitaj de la naturaj portantoj. Finiĝis la tago per koncerto de JoMo.

La Festivalo daŭris du tagojn. En la dua tago, dimanĉe, okazis Konkursoj de poliglotoj de kvin studentaj kaj naŭ lernejoj teamoj. La premiojn por la prezentantoj kaj por venkintoj de la konkursoj disponigis Departamento de kulturo kaj turismo de la regiona administracio.

Tatjana Auderskaja

## En la Kopenhaga Librofoiro

Dana Esperanto-Asocio partoprenis en la Librofoiro de Kopenhago, kiu okazis de la 9a ĝis la 11a de novembro en la Bella Centro, konata al la partoprenintoj de la pasint-jara UK en Kopenhago. La Librofoiro estas grava ĉiujara kultura evento kun preskaŭ 30 mil vizitantoj.

Ni substrekis la jubilean jaron de Esperanto pere de la simbolo 125, kiun la partoprenantoj povis vidi ne nur en nia budo sed ankaŭ en 20 grandaj ekranoj 20 fojojn hore, entute 5400 fojojn! Peter Wrå estis intervjuita de la kultura programo P1 de la dana radio DR pri la Esperanta literaturo.

Heena Schrøder

## AEH kongresis

La 6a Internacia kongreso de Asocio de handikapitaj esperantistoj (AEH) okazis post kvin jaroj en Štíří dŭl (Skorpia valo) proksime de la urbo Krucemburk ekde la 13a ĝis la 16a de septembro 2012.

Partoprenis 53 esperantistoj, plejparte el Ĉeĥio, tamen ankaŭ kelkaj el Hungario, Bulgario kaj Nederlando.

La ĉefprelegon pri la kongresa temo “Helpu, kie vi povas” prezentis Pavla Dvořáková havanta spertojn precipe rilate al helpado de handikapitaj infanoj. Psikiatro Max Kašparŭ pritraktis la interhomajn rilatojn, kiujn li signis kiel “sorĉitan cirkolon” kaj montris, kiel simple oni falos en tiun sorĉitan cirkolon kaj kiel malfacilas ĝin eliri.

Dum la tuta kongreso daŭris ekspozicio “De Komenio al Zamenhof” kiun preparis Viktor Dvořák kaj ekspozicio de la eldonaĵoj de la eldonejo KAVA-PECH en Esperanto kaj en la ĉeĥa, inter ili pluraj rilatis al Esperanto kaj interlingvistiko.

Okazis ankaŭ la laborkunsido kun kutimaj partoj. La raporto pri la agado estis iom pesimisma (la membraro malmultnombriĝas, precipe la aranĝojn partoprenadas malpli kaj malpli da personoj, precipe pro malboniĝanta sanstato de pluraj kaj ĝenerala malaltiĝo de la vivonivelo de handikapitaj personoj). Tamen ne mankis laŭdoj de la utileco de la asocio, ĝiaj regulaj edukaj seminarioj en Skokovy, ktp. La partoprenantoj aprezis plurajn salutmesaĝojn, kiujn oni laŭtleĝis, inter ili ankaŭ el tre foraj lokoj.

Estis ankaŭ elektita nova estraro, kiu plu laboros sub prezidantino Lenka Angelová. Grandan merititan aplaŭdon rikoltis la nelacigebla kunfondintino de la asocio Jarmila Rýznarová, kiu en siaj 83 jaroj estas nekredeble aktiva kaj denove transprenis la funkcion de asocia sekretario por la sekvaj kvin jaroj.

Sed ne regis nur laboro! Oni ekskuris en la proksiman urbon Krucemburk, kelkaj eĉ piede, tie oni vizitis muzeon de la fama ĉeĥa pentristo Jan Zrzav. Alia busekskurso gvidis al la kastelo Žiár kaj al la pilgrimpreĝejo “Zelená hora” (verda monto), enskribita en la liston de Unesko kiel kultura heredaĵo.

Ankaŭ estis agrable ĝui plezurajn vesperajn programerojn, kun muziko, tombolo, kantado ĉe fajro sub akompano de du gitaroj en indiana tendo, babilado.

Petro Chrdle

## Jubilea semajno en Katalinio

Kutime la unua oktobra semajno estas rezervata por la Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo, kiun organizas grupeto da entuziasmaj esperantistoj el Barcelono kaj Sabadell sub la gvido de Luis Serrano Pérez.

La ĉi-jara jubilea 20a Semajno okazis la 6–13an de oktobro en la ĉemara urbo Cambrils, je 16 km sude de Tarragono. Ĉi-foje la aranĝo atingis rekordan nombron da partoprenantoj. Alvenis 144 gesamideanoj el 13 landoj. Ni loĝis en la granda kvarstela hotelo *Cambrils* proksime de la plaĝo, kiu etendiĝas je 18 kilometroj laŭ la maro. Multaj profitis la posttagmezajn paŭzojn por promeni laŭ ĝi kaj bani sin en Mediteraneo. Nia aranĝo estis la lasta de tiu ĉi sezono dum kiu la hotelo funkciis. La prezoj estas malpli altaj ol dum la someraj monatoj.

La dimanĉan inaŭguron ĉeestis kaj bonvenigis nin la urbestro de Cambrils kaj du membroj de la urbestro. Nome de UEA salutis la ĉeestantaron Barbara Pietrzak el Pollando. Ŝi pli poste prelegis pri la 125-jariĝo de la Unua Libro. La saman temon oni ankaŭ pritraktis en debato, kiun gvidis Luis Serrano. Ĉiutage (krom la tuttaga ekskurso) Rodica Todor el Rumanio animis kun granda sukceso la Esperanto-kurson. Pro ŝia profesia psikologia sperto la kurso fariĝis interesa kaj sekvis ĝin multaj entuziasmaj lingvoŝatantoj. Ŝi eĉ havis ideon krei komunan libron pri la temo “Kial restas multaj personoj ĉiamaj komencantoj kaj kiamaniere ni povus solvi tiun fenomenon?”

Gian Carlo Fighiera el Italio allogis prezentis la verkon de Victor Hugo *La Belulino, la Monstro kaj Nia Damo*. La geedza paro Michèle kaj Hubert el Belgio klarigis kiel plibonigi sian Esperanto-lingvoscion per prelegoj. Josée Boccadifuoco el Francio rakontis kortuŝan biografion de siaj gepatroj *Rememorero de milito*. Jūratė Bušienė kaj Aldis Bušs el Latvio konigis al ni informojn pri la baltaj landoj: Litovio, Latvio kaj Estonio. Pri sia lando ili montris film-fragmentojn el kultura kaj festa vivo kaj rakontis pri sistemo de instruado en Latvio. Krome ni eksciis, kio estas hipofeo: planto kun oranĝaj beroj enhavantaj multe da vitamino C. Manfred Sona el Germanio enkondukis kaj klarigis interesan temon: “Baza enspezo senkondiĉa”. Ĝi estus bona rimedo por forigi malriĉecon kaj doni kondiĉojn, por ke ĉiu povu vivi digne. La prezidanto de



Esperantistoj fermas la sezonon en Cambrils

HEF (Hispana Esperanto-Federacio) José Antonio del Barrio rememorigis gravajn hispanajn esperantistojn de antaŭ la hispana intercivitana milito.

Pro la ĉiutaga vespera hotela programo ne eblis okazigi kelkajn el niaj vesperaj programeroj. Tial iuj geanoj pli frue enlitiĝis, aliaj profitis dancadon, spektis flamenkan prezenton kaj magiaĵojn. Tamen ni ĝuis la du interkonajn vesperojn kun hispana ŝaŭmvino “Cava” kaj ankaŭ vesperon kun “cremat” (bruligita rumo kun aldonaj spicajoj).

La premio Ada Sikorska estis ĉi-foje aljuĝita al Vilhelmo Lutermano, kiu multe laboras por Esperanto. Li prizorgas la retforumon MAS, redaktas Esperanto-version de *Le monde diplomatique* kaj eldonas Esperanto-librojn. Li loĝas en Kubo kaj pro tio li ne povis transpreni la premion persone.

En la Semajno kutime estas unu tuttaga kaj du duontagaj ekskursoj. Dum la unua duontaga ekskurso ni vizitis la Esperanto-muzeon en Pau d’Ordal kaj la vinkelon Massana. Tie ni gustumis kaj povis aĉeti diversspecajn vinojn. La dua duontaga ekskurso celis la monaĥejon de Escornabou. Ĝi estis plurfoje renovigita kaj nun servas kiel muzeo. Apuda rigardejo donis eblecon observi belan kaj vastan ĉirkaŭaĵon. La tuttaga ekskurso estis iom nekutima. Unue ni

Regalado per “paella” en la 20a Semajno.



vizitis planetarion en la urbo Castelló. Poste ĉiuj 90 ekskursantoj estis invititaj al la hispana specialaĵo “paella”, kiun antaŭ niaj okuloj preparis s-ro Conejero en sia hejmo. La afabla akcepto fare de la familio estis por ni vere agrabla surprizo. Ni ankaŭ gustumis kelkajn fruktojn el la ĝardeno de la gastigantoj.

La Semajno estis sukcesa, la vetero favora, hotela manĝo abunda, la etoso gaja kaj amika. Koran dankon al niaj fervoraj organizantoj kaj kunhelpantoj pro la bona laboro, kiu ebligis al ni ĉeesti tiun ĉi ŝatatan aŭtunan eventon. Ĝis revido venontjare denove en Katalunio.

**Liba Gabalda**

## Feria renkontiĝo en Svislando

(ĈIIC / EPĈ) De la 19a ĝis la 21a de oktobro apud La Chaux-de-Fonds okazis SFERO — Svisa Feria Esperanta Renkontiĝo kun partopreno de kvin dekoj da familianoj, inter ili estis beboj kaj etaj infanoj. Por ili la organizantoj proponis apartan prizorgadon kun la helpo de la gepatroj. En granda salono la esperantistidoj gaje ludis per ludbrikaj kaj ligna fervojo.

En sabato allogis la vizito al la zoologia ĝardeno, kaj en dimanĉo — la proksima aŭtuna arbaro. Neniam la infanoj krokodilis inter si, ĉar ili venis el diversaj lingvoregionoj.

Por plenkreskuloj estis dediĉita tre altnivela programo: diskuto pri antaŭjuĝoj, integriĝo de eksterlandanoj en Svislando, lumbildprelego pri la pilgrimo al la okcidenta mondfino “Vojo de Sankta Jakobo” en Santiago de Compostela, filmo pri Barcelono, prelegoj...

Dum SFERO oni spertis grandan entuziasman etoson, ĉar ni praktike pruvadis la eblon dissaltigi la obstinan lingvan baron.

**Dieter Rooke**



## Ponto Esperanto

La 3an de oktobro 2012 la Konsilio de la urbo Bydgoszcz (Pollando) decidis honori la 125-jariĝon de Esperanto per nomigo de la ponto-konstruaĵo trans la rivero Brda en Bydgoszcz kiel “Most Esperanto” (Ponto Esperanto).

La 27an de oktobro okazis la oficiala malkovro de du tabuloj kun la surskribo “Most Esperanto” je ambau flankoj de la rivero Brda en Bydgoszcz.

La ceremonion gvidis Esperante kaj pole Lech Zagloba, prezidanto de la urba komisiono pri kulturo kaj edukado kaj esperantisto de pli ol 40 jaroj. Festparolis Stefan Pastuszewski, prezidanto de la urba komisiono pri stratnomigo, kiu substrekis, ke la ponto Esperanto estas ankaŭ ponto de interkompreniĝo inter homoj de diversaj nacioj, lingvoj kaj kulturoj, kaj dankis al Esperanto-organizaĵoj en Bydgoszcz pro ilia aktiva promocio de la urbo Bydgoszcz en 125 landoj de la mondo. La ceremonion partoprenis kelkdek personoj el Pollando kaj gastoj el Germanio, Kazahŝtano, Ruslando kaj Senegal.

La filio de la Pola Televido TVP en Bydgoszcz en regiona tagraporto dum pli ol 2 minutoj raportis pri la evento.

**Andrzej Grzębowski**

## San-Paŭlo: Duobla jubileo

116 personoj el 18 urboj partoprenis la 6an Esperantan Kongreson de la ŝtato San-Paŭlo en la urbo San-Karlo la 12–14an de oktobro. Per ĉi tiu kongreso ni kunfestis du jubileantojn: la 125-jaran Esperanton (julio 1887) kaj la 75-jaran Esperanto-Asocion de San-Paŭlo (marto 1937).

La programo komenciĝis vendrede posttagmeze per video-prezento pri

Hanojo, la urbo de ĉi-jara Universala Kongreso. Sekvis prelegoj de Rafael Zerbetto (Esperanto kaj Rio+20), Elmir dos Santos (Interna ideo) kaj profesoro Francisco Wechsler (argumentado por Esperanto). Vespere la kongresanoj ĉeestis la prelegon de prof. David Bianchini, kiu dulingve prezentis la ĉeftemon de la kongreso “Esperanto: 125 jarojn poste”. Fine sin prezentis la flutisto Felipe Castro kaj la paro Marcela Escobar (soprano) kaj Luiz Fernando (piano-ludisto).

La sabata programo estis varia kaj bunta. Matene prelegis d-ro Osvaldo Pires de Holanda (Paul Berthelot), Osmar da Silva Alves (hebrea lingvo), James Piton kaj Ísis Okabe (skoltismo) kaj Guilherme Jardim (lingvoj de Tolkien). Posttagmeze prelegis Aparecida Araujo (karavano al la 97a UK), Audino Castelo Branco (matematiko) kaj Emílio Cid (lerno per Greenpeace). En la sabata Arta Vespere sin prezentis la grupo de tamburistoj Yanagi Taiko, la kantistaro de emeritaj funkciuloj de AFPESP, la esperantistino Elma do Nascimento kaj la aktorino Eva Genônimo.

Dimanĉe Rafael Zerbetto malfermis la programon per prezento pri Muzaiko. Sekvis lin prelegoj de Alex Cessário (Tempoplanado) kaj José Roberto (bildartoj).

Dum la evento okazis ankaŭ aliaj aktivadoj gvidataj de Francisco Wechsler (metiejo pri informado), José Roberto (metiejo pri instruafero), César Dorneles (lerno-ludo), Maria Luiza (cirklaj dancoj) kaj la paro Ísis Okabe kaj James Piton (skoltaj ludoj).

La fulmokuson de Esperanto gvidis César Dorneles (vendrede), Karina Oliveira (sabate) kaj Osmar da Silva (dimanĉe). La kurseto estis bone vizitata kaj plaĉis al la ĉeestantoj.

Bone vizitata estis la libroservo de EASP, kiu venigis el alilandaj eldonejoj diversajn titolojn, speciale por la kongreso. Neniam antaŭe brazilanoj vidis en regiona Esperanta aranĝo tiel multajn allogajn importitaĵojn.

Studentino pri ĵurnalismo Amanda Ceretti intervjuis kelkajn esperantistojn cele al pretigo de sia universitata laboraĵo pri Esperanto. Du tagojn antaŭe, aperis en la loka gazeto *Jornal Primeira Página* artikolo pri la okazonta kongreso.

**José Roberto Tenorio**

## MKR revenis al Adriatiko

Pasintjare la Mont-Kabana Renkontiĝo (MKR) venigis siajn partoprenantojn al la belega pinto Stol je aŭstria-slovenia limo, kie fine de septembro regis belega, kvazaŭ somera vetero. Ĉi-jara MKR okazis tri semajnojn pli poste, inter la 11a kaj 14a de oktobro, sed ĉe marbordo (la ejo estis nur 50 metrojn for de la maro!), en nord-adriatika urbeto Lovran en Kroatio, kaj ĉiuj esperis ke la vetero estos almenaŭ same bela. Bedaŭrinde, tio ne realiĝis. Antaŭ MKR la vetero estis belega, post ĝi eĉ pli bela... sed dum ĝi pluvis ofte, kaj la ekskursoj al plej alta pinto de Istrio (Učka, 1401 m), kaj al la interesa roka pinto Sisol (835 m) ne estis tiel agrablaj.

Sed MKR tamen havis siajn brilajn momentojn: la loĝado estis la plej luksa en ĉiuj 23 jaroj de la aranĝo, kun hotela standardo kaj nepriskribebla bela rigardo al la golfo de Rijeka kaj najbaraj insuloj. Krome, spite al ŝanĝema vetero, la marakvo ankoraŭ estis varma (21 gradoj), kaj la partoprenantoj uzis la eblon naĝi. Aldone, samtempe kun MKR en Lovran okazis tradicia festo “Marunada”, festo de kaŝtanoj, kiam oni rikoltas kaŝtanojn kaj preparas el ili bongustajn kukojn, kaj la tuta festo estas kompreneble aranĝita kun multe da muziko, vintrinkado kaj ĝenerala festema etoso.

Ĉi-jaran MKR-on partoprenis 33 partoprenantoj el ok landoj, kaj la organizantojn speciale ĝojigis tio, ke ĉi-jare estis pli multe da gastoj el pli foraj landoj: Ruslando, Svedio, Germanio... MKR ja estas nur kvartaga aranĝo, ekde jaŭdo ĝis dimanĉo, kaj ne indas longe vojaĝi por tiel mallonga restado — sed ĉiam eblas organizi la vojaĝon tiel ke oni aldone vizitu ankaŭ aliajn interesajn de la regiono kaj lokajn esperantistojn.

**Vanja Radovanović**

## PostSomera Klaĉkunveno

La Klaĉkunveno PostSomera (KKPS) 2012 okazis de la 2a ĝis la 4a de novembro en Delft, Nederlando.

Gastigis nin la skolta domo “Het Kruithuis”. Aliĝis 62 homoj el 12 landoj, partoprenis 54 homoj, unu katino kaj du famaj pluŝaj birdoj. Inter ili la malplej juna estis 46-jaraĝa, kaj la plej juna 5-jaraĝa. Estis manĝitaj 7 kg da pastaĵo, 5 kg da polento, 3 kg da kususo, 2 kukoj, ĉirkaŭ 30 bovloj da tiramisuo, kaj trinkitaj 124 bieroj.

Malgraŭ la pluva vetero, vendrede posttagmeze la frualvenintoj povis partopreni antaŭkongresan promenadon tra Roterdamo. Kelkaj preferis resti malsekaj en kafejo, aŭ viziti la Centran Oficejon de UEA/TEJO.

La oficiala programo komenciĝis per prezentado, fare de Roĉjo kaj Alekĉjo, pri Steloj, nova, universala Esperanto-trinkkuponon. Post la vespermanĝo oni daŭrigis per Homlupa Ludo, amikaj babiladoj kaj gustumado de germana ĉokolado. Sabate okazis la tre atendita biciklado ĉirkaŭ Delft, gvidata de Nico. Dume, en la domo, Manuela gvidis neformalan kuirartan atelieron, kies rezulto estis inter alie bongusta jogurta kuko. Posttagmeze Céline instruis kelkajn teĥnikojn de desegnado, kaj Gijom Armide prelegis pri Neperforta Komunikado.

Gijom, kun sia koncerto, estis ankaŭ la stelulo de la vespero, kiu daŭris per pliaj ludoj, klaĉoj, muziko, kaj eĉ bambumado. Dimanĉe matene Manuela prezentis enkondukon al la analizo de klaĉoj kiel socia fenomeno.

Dum la tuta klaĉkunveno funkciis vigla trinkejo, en kiu jam eblis pagi nur per steloj. Krom tio, dum la semajnfino okazis projekciado de filmeto pri PSKK 2006, montrado de fotoj de la someraj aranĝoj, cerbumado pri la organizado de la sekva FESTO, kurseto de Esperanto, kaj kompreneble hazarda klaĉado.

La organizantoj elkore dankas la partoprenintojn kaj la plurajn helpintojn. Sendube el tiuj ankaŭ devenas la sukceso de la evento, fakte eĉ pli granda ol kiom komence antaŭvidite. Jam estas kelkaj planoj por venontjara KKPS: se vi interesiĝas kunorganizi aŭ havas proponojn, vi bonvenas skribi al [kkps2012@googlegroups.com](mailto:kkps2012@googlegroups.com). Vi ankaŭ estas varme invitetaj krei multe da klaĉindaĵoj dum la tuta jaro: okazoj certe ne mankos, kaj tio donos sencon kaj materialon por nia aranĝo!

**Manuela Ronco**



Ne povas manki en la hotelo *Esperanto* portreto de Zamenhof, la plej fama bjalistokano.

## Hotelo Esperanto en Bjalistoko

La 8an de novembro 2012 en Bjalistoko estis malfermita nova, tristela hotelo *Esperanto*. Ĝi situas en la centro de la urbo, je 200 metroj de la palaco Branicki, vid-al-vide al la granda parko Planty. La hotelo ofertas 36 lokojn en dultaj ĉambroj kaj en du apartamentoj *Zamenhof* kaj *Kawelin* kaj apartenas al la firmao *Casablanka*, kiu posedas ankaŭ la kafejon *Esperanto* en la urbo-placo de la naskiĝurbo de Zamenhof.

La urbestro de Bjalistoko Tadeo Truskolaski en la solena malfermo de la hotelo diris Esperante: “Ni, loĝantaro de Bjalistoko, estas fieraj pro la fakto, ke ĝuste en nia urbo naskiĝis Ludoviko Zamenhof, la kreinto de la internacia lingvo Esperanto”. El la tuta mondo venis gratulmesaĝoj al Justyna Lewkowicz — la estro de la hotelo.

Fine de la solenaĵo okazis lotumado, dum kiu nia volontulino Arina Osipova (Ruslando) gajnis la eblecon tranokti senpage en la apartamento *Zamenhof*, kaj la aŭtorino de ĉi tiu artikolo ricevis kuponon por senpaga dupersona vespermanĝo en la eleganta restoracio *Kawelin*.

Bedaŭrinde, pro la paneo de la mal-mola komputila disko kun preparita Esperanto-materialo, dume mankas Esperanto-versio de la hotela retejo <http://www.hotelesperanto.net>, sed oni promesis solvi rapide la problemon.

**Elżbieta Karczewska**

## Nova lingvoinstrua strategio?

**(Edukado.net)** Laŭ la planata lingvoinstrua strategio de la hungaria registaro, baldaŭ traktota en la Parlamento, oni planas radikale reformi la lingvoinstruadon en Hungario.

La unuan fremdan lingvon oni komencu lerni en la aĝo 10 jaroj, la dua lingvo eniros la lernejsistemon por la infanoj 13-jaraj.

La unua deviga fremda lingvo estu la germana, kaj ne la angla kiel ĝis nun. Oni opinias, ke la unua lingvo devas esti kompleksa, egale malfacila. Lernante malfacilan lingvon la infanoj alkitimigias al la lingvolernado, kaj povos pli facile lerni la aliajn lingvojn. La angla ne taŭgas por tiu celo, ĉar en la komenco de la lingvoinstruado oni tro rapide progresas kaj poste ne emas investi laboron kaj tempon por profunda lernado.

Oni stimulu la lernejojn al instruado ne nur de la germana kaj angla, kaj por tio oni lanĉus “Premion de la Lingva Multkoloraĵo” por tiuj lernejoj, kie oni instruas la plej maloftajn lingvojn.

Laŭplane ĝis la aĝo 18 en Hungario la junuloj devos sisteme lerni tri fremdajn lingvojn. Se iu frekventas 8-jaran gimnazion (inter la aĝoj 10 ĝis 18) el la tri devigaj lingvoj unu lingvo devos esti nepre la latina.

Ekde la 2017a jaro neniu junulo povos eniri universitaton sen atestilo pri kompleksa, B2-nivela lingvokono laŭ la KER-sistemo.

Ĝis 1989 la rusa estis la unua deviga fremda lingvo kaj instruata ekde la 10a ĝis la 18a jaraĝo. Poste la instruistoj de la rusa devis en rapidaj vesperaj kursoj transformiĝi je instruistoj de aliaj lingvoj, ĉefe de la angla kaj germana.

Aldonendas, ke Esperanto rajtas esti oficiale instruata en ajna lernejo en Hungario, se estas tie diplomita instruisto, kaj leviĝas intereso pri la lernado de tiu lingvo. Danke al la Esperanto-fako, kiu funkciis dum ĉ. 40 jaroj en Hungario, nun estas ĉ. 150 diplomitaj Esperanto-instruistoj.

**Katalin Kováts**

## Unufraze

★ Ĝenerala Direktoro de UEA Osmo Buller dum sia restado en Havano (21-28 okt 2012) renkontiĝis kun la vicministro pri kulturo Fernando Rojas, kun kubaj e-istoj, prelegis ĉe la Kuba UN-Asocio, k transdonis al la estraro de la Kuba E-Asocio 500 eŭrojn kiel subtenon de la Konto Espero de UEA por la e-istaj viktimoj de la uragano Sandy. (GK UEA)

★ 6-7 okt en la Tokia urbocentra parko “Hibiya” Japana E-Instituto k Japana E-Junularo starigis E-budon k plurfoje okazigis E-kurseton kadre de la “Tutgloba Festo Japanio 2012”, kiun vizitis ĉ. 100 mil personoj, el kiuj pli ol mil ricevis informojn pri Eo. (ĈIIC)

★ 12 okt en la domo de la Ĉina Internacia Eldona Grupo okazis festkunveno okaze de la 125-jariĝo de Eo, dum kiu en ĉeesto de diverslandaj e-istoj k ĵurnalistoj estis prezentita nove eldonita albumo *Antaŭen kun Espero*, redaktita de Hou Zhiping. (ĈIIC)

★ 3 nov 2012 Mireille Grosjean prelegis antaŭ 80 personoj pri “125 jaroj da justa komunikado per la internacia lingvo Esperanto” en la centro CODIAM en Kotonuo, Benino. (M. G.)

★ Danke al sponsoro en la E-urbo Herzberg am Harz estas starigita E-benکو kun polurita granita sidloko kun subskribo en la stacidoma atendohalo inter la kajo k la bufedo. (ICH)

★ Je 15 nov al la 98a UK okazonta en julio 2013 en Rejkjaviko aliĝis nur 211 personoj el 42 landoj, plej multe el Japanio 21, Germanio 20, Nederlando 14 k Islando 13. (uea.org)

★ La sekva ordinara sesio de la E-Civito unuafoje okazos en Afriko — en Buĵumburo (Burundio) okaze de la afrika konferenco je Pasko 2013. (HeKo)

★ En oktobro 2012 estis presita la 7a eldono de *Poŝamiko*, populara lernilo de Beatrice Allée k Katalin Kováts, kies suma eldonkvanto nun superis 10 mil ekz. (Edukado.net)

★ La franca studento k aktivulo de JEFO Quentin Weber-Seban en septembro komencis unujaran deĵoradon en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo kiel volontulo de TEJO. (TEJO Tutmonde)

★ Kvar libroj konkuras por la premio “La Verko de la Jaro 2012” de la Ea PEN-Centro: *Flugi kun kakatuoj* de Trevor Steele, *Homoj kaj sortoj* de Julia Sigmund, *La Princo ĉe la hunoj* de Eugène de Zilah, *Ne ekzistas verdaj steĵoj* de Liven Dek. (HeKo)

## Kultura Semajnfino en Sarlando

La 19–21an de oktobro okazis la 66a Kultura Semajnfino de la Sarlanda Esperanto-Ligo. La vendredan vesperon Friederike Fillmann raportis pri sia vojaĝo al Vjetnamio kun multe da belaj bildoj. Poste ni vidis malgrandan filmon pri la UK en Hanojo.

Sabate ni aŭdis prelegon de prof. d-ro Markus Groß pri la islanda lingvo, ties fonetiko, historia evoluo kaj parenceco kun aliaj lingvoj. Sekvis prelego de Edgar Müller pri la geografio, historio kaj politiko de Islando. Posttagmeze Kreŝimir Barkoviĉ montris al ni interesajn aspektojn de siaj vivo kaj verko. (Dimanĉe li prezentis filmojn kaj fotojn pri siaj vojaĝoj, ĉefe al Japanio.) Vespere okazis internacia vespero ne nur kun prelegoj kaj kvizo pri Islando, sed ankaŭ kun multe da distraj programeroj. Kaj kun malgranda babilrondo finiĝis la 66a Kultura Semajnfino dimanĉe matene.

**Werner Faber**

## Ratkaptistoj jubileas

En la plene okupita salono de la gastejo Bücher en la vilaĝo Fuhlen la kvar muzikistoj de la nederlanda folkbando *Kapriol’!* ludis mezepokajn dancmelodiojn per malnovaj tamburo kaj ŝalmo, sed ankaŭ per modernaj memfaritaj flutoj el plastaj kaj defluilaj tuboj, kiuj generis tute strangajn sonojn. Kaj ankaŭ nur-voĉe sen instrumentoj ili sciis konvinki la publikon, nur per siaj fortaj voĉoj. Dancpromenado inaŭguris la duan parton de la vespero, dum kiu ĉiuj povis transmeti la muzikon en movadon. Dum la vic-, cirklo- kaj pardancoj ĉiu povis kundanci.

Invitis al tiu ĉi koncerto la Esperanto-grupo Ratkaptista Bando el Hameln por festi sian 25-jariĝon. Kaj 46

esperantistoj el Germanio, Belgio, Nederlando, Slovakio kaj Koreio kunvenis por kunfesti la jubileon. Kaj preskaŭ sama nombro da vilaĝanoj, urbanoj kaj aliaj neesperantistaj muzikŝatantoj venis al la koncerto. Antaŭtagmeze oni renkontiĝis por ĉiĉeronado tra la historia urbocentro kaj posttagmeze por viziti la renovigitan muzeon.

Salutvortojn transdonis Anne Höpken de la Esperanto-grupo Subvisurgo por la amikoj de la Supra Visurgo. Kaj Zsófia Kóródy donis al la prezidanto de la hamelna grupo, Heinz W. Sprick, la atestilon por la C1-lingvoekzameno, kiun li sukcese trapasis somere.

Dimanĉe antaŭtagmeze oni renkontiĝis al promenado tra la vilaĝo Fuhlen, kiu sukcese partoprenis en la konkurso “Nia vilaĝo havas estontecon”.

Nicky Janssen el Wommelgem en Belgio resumis siajn impresojn pri la jubilea semajnfino:

«Iam kiel infano mi aŭdis la rakonton pri la Ratkaptisto de Hameln’. Surpriziĝis mi, ke tiu urbo vere ekzistas! Dum jaroj mi estas rakontistino de fabeloj, do tiun rakonton kun multe da animo mi ĉiam ĝoje rakontis. Kiam mi kun amikoj planis liveri librojn al Herzberg kaj ili rakontis al ni, ke ili planas kunfesti la 25an datrevenon de la E-klubo *La Ratkaptista Bando* en Hameln, mia koro iom pli rapide batis. Ĉu ni interesiĝus kunfesti? Jes jes jes! Finfine vidi Hameln! Rigardi kiel la “ratoj” fartas nun... pli lerni pri la urbo, pri la rakonto... mi certe volis ĉeesti!

Kaj kiu surprizo... ne ratojn, tamen la faktojn, kiuj instigis por eki la legendon, mi apenaŭ trovis. Eĉ tamen aĉetis unu. Kion mi do trovis? Belegan urbocentron, kiun oni provas restaŭri tia, kia ĝi estis unue konstruita. Kaj kiu beleco! Kiu riĉeco!»

**Heinz W. Sprick**



Kapriol'! dancigas (Fotis Heinz W. Sprick)





# Tutmonda Esperanto-Adresaro

## Martin Schäffer respondas

La 1an de novembro 2012 estis lanĉita nova adresaro por Esperanto-parolantoj ĉe la retpaĝo [www.adresaro.org](http://www.adresaro.org). Temas pri la *Tutmonda Esperanto-Adresaro*. Ĝin kreis la fondaĵo *Esperanto Internacia*, kiu laboras ĉefe por Esperanto-informado kaj -instruado. *La Ondo* pridemandis s-ron Martin Schäffer, kiu estis la ĉefa iniciatinto de la projekto.

### Ĉu vi povas klarigi al ni la bazan ideon de la adresaro?

La ĉefa ideo de la adresaro estas doni al la Esperanto-uzantoj rimedon por kontakti unu la alian kaj serĉi kontaktojn. La adresaro estas iom speciala, ĉar ĝi kombinas plurajn ideojn, nome servon por personoj, kiuj serĉas korespondamikon, servon por Esperanto-vojaĝantoj kaj ĝeneralan adresaron, kiu permesas serĉon laŭ fakgrupoj, hobiaj kaj aliaj kriterioj.

### Bonvolu klarigi, kiujn specialajn eblecojn ofertas la adresaro?

En la "koresponda parto" eblas, ekzemple, elekti laŭ tradicia (poŝta) korespondado, laŭ reta korespondado aŭ laŭ reta babilado pere de Skajpo. En la "turisma parto" uzanto povas serĉi senkostajn tranokteblecojn, tranokteblecon kontraŭ eta pago, hotel-peradon, urbogvidadon, aŭ sendon de turismaj informoj. Krome vojaĝanto povas serĉi personojn, kiuj helpas dum restado en iu urbo aŭ kiuj pretas je renkontiĝo por konatiĝi kaj komune trinki aŭ manĝi ion.

### Kiuj personoj realigis la projekton?

La ĉefa iniciatinto estis mi. La ĉefprogramisto estis Dima Ŝevĉenko el Ruslando, sed krome helpis multaj aliaj personoj per konsiloj, ideoj kaj kontrolado de la paĝo.

### Ĉu vi opinias, ke la nova retejo estos tre populara?

Nu, mi supozas ke relative multaj homoj registriĝos, ĉar ĝi ofertas plej diversajn servojn kaj serĉeblecojn, kiuj ne ekzistas ĉe aliaj retpaĝoj. Menciindas, ke la aliĝo estas tute senkosta. Ankaŭ ekzistas la ebleco aliĝi kiel "Amiko". Personoj, kiuj aliĝas kiel "Amiko" kontribuas finance (ĉefe idealisme) por subteni la projektojn de la fondaĵo, sed "Amikoj" ankaŭ havas etajn avantaĝojn. Ili ekzemple povas vidi la plenajn kontaktoinformojn de la aliĝintoj (se ili permesis tion).

### Unuflanke la apero kaj ekfunkciado de la Adresaro vstigas oferton en Esperantujo, aliflanke ĝi eble malpliigos la uzantaron de similaj projektoj, ekzemple, de Pasporta Servo...

Prave vi skribas, ke pere de la nova oferto Esperantujo fariĝas pli bunta. Pasporta Servo estas tre bona projekto, kiu specialiĝas pri la oferto de senkostaj tranokteblecoj. Mi multe helpas al Pasporta Servo kaj estas Landa Organizaĵo por pluraj latinamerikaj landoj. Simple, estas rekomendinde registriĝi en la du retejoj. Laŭ mia opinio tio vere ne estas problemo, ĉar estas facile registriĝi. Oni ĝenerale bezonas malpli ol dek minutojn. Serĉantoj de senkostaj tranokteblecoj simple serĉu en la du paĝoj. En aliaj kazoj la Tutmonda Esperanto-Adresaro ofertas plej diversajn serĉeblecojn kaj ofertojn.



### Kiujn projektojn ĝis nun subtenis Esperanto Internacia?

Menciindas, ke *Esperanto Internacia* estas relative nova fondaĵo, do ne eblis subteni multajn projektojn. En la mallonga ekzistotempo la fondaĵo danke al mecenatoj tamen subtenis diversajn projektojn, kiel ekzemple informan kaj instruan vojaĝon al Nikaragvo, eldonadon de informbroŝuro pri Esperanto por Malto, gazetaran agadon okaze de la jubileo en Meksiko, Esperanto-kurson en la nacia universitato de Nikaragvo kaj standon ĉe la kongreso de la

Tutmondaj Verduloj en Senegal. Aktuale ĝi subtenas la seminariojn de *Scio sen Bariloj* kaj Mireille Grosjean en Benino kaj Senegal. Krome la estraro jam decidis pozitive subteni la unuan Indonezian Kongreson de Esperanto. Fariĝante "Amiko", uzantoj de la adresaro subtenas rekte tiajn agadojn.

### Ĉu vi jam havas ideojn pri plibonigo de la adresaro?

Jes, jam ekzistas multaj ideoj, kiujn ni planas realigi. Nun tamen ankoraŭ ne estas klare, kiuj ideoj estas relative facile realigeblaj el programista vidpunkto. En la dezir-listo estas ekzemple map-sistemo, la ebleco enmeti la familian situacion por tiuj, kiuj deziras tion, versio por poŝtelefonoj, sistemo por aŭtomate presi la gravajn informojn (se la homoj tion permesas), enmeto de serĉo laŭ lingvoj kaj lingvo-konoj, serĉado de lingvoamikoj aŭ -helpantoj. Krome ekzistas la ideo, ke ankaŭ personoj, kiuj ne parolas Esperanton povas oferti tranokteblecojn por Esperanto-parolantoj. Tio speciale gravas en ofte vizitataj turismaj lokoj. Alia ideo estas, enmeti al la adresaro liston de landaj asocioj kaj fakasocioj.

### Kaj pri la movado? Ĉu ĝi ankaŭ servos al la movado?

Nu, jam la faciligado de kontaktoj, laŭ mia opinio, helpas al la movado. Krome ekzistas ankaŭ rekta helpo. Uzantoj havas la eblecon montri la pretecon helpi al la movado per plej diversaj agoj. Krome ekzistas la intenco ebligi listigon de Esperanto-organizaĵoj (landaj asocioj, lokaj grupoj, fakasocioj). Fine Esperanto-organizaĵoj povus uzi la adresaron ankaŭ por la propra membro-administrado.

**Ni dankas pro la intervjuo, gratulas pro la iniciato kaj deziras sukceson al la Tutmonda Esperanto-Adresaro ĉe [adresaro.org](http://adresaro.org) kaj al la fondaĵo Esperanto Internacia.**



## Ĉu Eŭropo rajtas patenti ĉimpanzojn?

### de Dafydd ab Iago

Pluraj organizaĵoj el Germanio, Svislando kaj Britio kontraŭas patentadon de genetike adaptitaj ĉimpanzoj. La patento kun la numero EP1456346 estis donita de la Eŭropa Patenta Oficejo (EPO) en februaro 2012 al la usona kompanio *Intrexon*.

Certe povas esti, ke estas medicina uzado de la genetike adaptitaj ĉimpanzoj, kiuj havas DNA-fragmentojn devenajn el insektoj kaj destiniĝas por uzado en farmacia esplorado.

Tamen aro de neregistaraj organizaĵoj, kiuj kontraŭas misuzadon de animaloj, argumentas ke tiu patento transiris etikajn limojn en patenta leĝo. Eble pli grave, la patento povas krei komercajn stimulojn por pliaj eksperimentoj kaj certe la — novaj — animaloj ne estos traktataj bone.

“Bestoj devus esti konsiderataj kiel infanoj kaj traktataj kun respekto kaj protektataj kontraŭ komerca misuzado. Oni absolute ne povas pravigi la patentadon por grandaj simioj. Estus, fakte, ofendo al nia propra specio”, — diris Christoph Then el la neregistara organizo *Testbiotech*. — “La Eŭropa Patenta Oficejo klare transiris limojn akceptitajn de la eŭropa socio”.

La NRO-oj ankaŭ plendas ke la EPO donis ĉi-jare jam tri patentojn por genetike modifitaj ĉimpanzoj. Du el la patentoj estis por la usona firmao *Intrexon* kaj unu al alia usona firmao *Altor BioScience*. La NRO-oj timas ke baldaŭ estos patentitaj ankaŭ musoj, ratoj, kunikloj, katoj, hundoj, bovinoj, kaproj, porkoj, ĉevaloj, ŝafoj kaj aliaj simioj.

Ekde 1992 EPO jam donis ĉirkaŭ 1200 patentojn pri bestoj. Pluraj patentoj estis donitaj pri grandaj simioj. Tamen pluraj membroj de la Eŭropa Unio malpermesas eksperimentojn kun grandaj simioj. En 2010 EU akceptis direktivon, kiu malpermesas la uzadon de grandaj simioj en esplorado krom en esceptaj cirkonstancoj.

“Scienco konfirmas en ĉiuj novaj studoj, kiel proksimaj estas ĉimpanzoj al homoj, surbaze de la kognitivaj kapabloj, socia vivo, kulturo, uzo de iloj kaj eĉ de la kapabloj kunsenti kun malfortuloj”, — diris profesoro Christophe Boesch, prezidanto de la Fondaĵo por Sovaĝaj Ĉimpanzoj.

## Ruslanda akvopuriga teknologio promociita en Ĉinio per Esperanto

En IKEF-China 2012 — la 6a Jarkunveno de ĉinaj Esperanto-komercistoj — okazinta ekde la 29a de oktobro ĝis la 2a de novembro 2012 en Ĉangŝa — oni aŭdis pri nova sukceso en la kampo de Esperanto-komercado.

Helpe de la Internacia Lingvo reprezentantoj de la kompanio TjumenNIIgiprogaz (subfirmao de la konzerno Gazprom) partoprenis la ekspozicion “Water Expo China 2012” kaj aranĝis du prezentaĵojn.

Unuaj paŝoj al tio estis faritaj antaŭ ĉirkaŭ duonjaro, kiam komenciĝis korespondado inter du Esperanto-komercistoj: la ĉino Long Zhang (Urso) kaj la ruso Stanislav Belov (Stano). Kiel estro de la PR-sekcio de la menciita ruslanda firmao, Stanislav serĉis novajn vojojn por promocii la akvopurigan teknologion “Vodopad” (Akvofalo), kiu estis kreita en lia

firmao kaj sukcese uzata en Ruslando. Ordinare tia intertraktado postulas longan tempon kaj diversajn certigojn, sed la reciproka fido, tiom kutima en Esperanto-komunumo, helpis superi multajn barierojn kaj rapidigi la procezon.

Post korespondado kaj sola mallongdaŭra renkontiĝo en la 97a UK en Hanojo, la ĉina firmao Kun Peng Power (Bei Jing) Technology Co., Ltd, kies direktoro estas Gavin Cui, amiko de Long Zhang, alvenis invito al la ruslandaj partneroj partopreni la ekspozicion “Water Expo China 2012” la 29–31an de oktobro kaj okazigi en Ĉinio kelkajn prezentaĵojn de la teknologio “Vodopad”.

Rezulte de tio du reprezentantoj de TjumenNIIgiprogaz, inkluzive de la esperantisto Stanislav Belov, vojaĝis al Pekino kaj laboris tie dum ses tagoj. En tiu tempo ili promociis la teknologion de sia firmao en la ekspozicio kaj aranĝis du gravajn prezentaĵojn en la grandega konstrua korporacio Beijing Urban Construction Group Co., Ltd (jara buĝeto \$8,65 mlrd) kaj la Akvosciencia Akademio de la Pekina Pedagogia Universitato. Ambaŭfoje la akvopuriga teknologio elvokis gravan intereson kaj estis aktive diskutata el vidpunkto de ĝia aplikado en la ĉina merkato.

Fine estis subskribita interkonsento pri kunlaboro inter la firmaoj Kun Peng Power (Bei Jing) Technology Co., Ltd kaj TjumenNIIgiprogaz, kies celo estas promocio de produktoj kaj servoj de la ruslanda firmao en la ĉina merkato.

Menciindas, ke ĉiuj antaŭaj preparoj kaj intertraktoj okazis en Esperanto. La fonta lingvo por plejmulto da prezentaĵoj, broŝuroj kaj filmetoj (tradukitaj al la ĉina kaj la angla) ankaŭ estis Esperanto. Dum la laboro en Ĉinio la Internacia Lingvo estis vaste uzata kiel pontolingvo.

Stanislav Belov

La 14an de oktobro en Vladivostoko post longa malsano mortis

### Aleksandr Borisoviĉ Titaev (1951-2012)

docento de la For-Orienta Ŝtata Teknika Universitato, kandidato de teknikaj sciencoj; kunfondinto (1980) kaj prezidanto (ekde 1987) de la Vladivostoka Esperanto-klubo *Pacifiko*, aŭtoro de la lernilo *Основы интерлингвистики и эсперантологии* (2005), instruanto kaj disvastiganto de Esperanto kaj esplorado de ties historio en la Fora Oriento de Ruslando.

*Ni funebras kaj kondolencas.*

## E@I-projektoj, financataj de EU



La 2012a jaro estis denove frukto-dona por E@I. Estis aprobitaj tri el la ses monpetoj, en kiuj E@I estis envolvita. En ĉiuj tri E@I estos “nur” partnero — do ĝi ne kunordigos la projektojn, sed partoprenos en ili kiel partnero. Tio ankaŭ havas avantaĝon, ĉar kunordigado estas kutime la plej burokrata kaj temporaba afero, dum partnero povas plene koncentriĝi al la praktikaj laboroj.

1. **lingvo.info**. Temas pri rekonstruo de *Lingva Prismo* ([www.lingvo.info](http://www.lingvo.info)), kiun E@I kreis (kunlabore kun kelkaj organizoj) en 2003. La paĝaro celas per interesa, amuza formo prezenti diversajn lingvojn, lingvan diversecon kaj prilingvajn temojn (lingva ekologio, ekonomio, lingva politiko ktp.). La projektideon komune ellaboris EEU (Eŭropa Esperanto-Unio), E@I kaj Studio Gaus el Germanio: EEU kiel kunordiganto kaj verkanto de la monpeto, kaj E@I kaj Studio Gaus kiel kreintoj de *Lingva Prismo*, kies ideo estis la nova projekto. Aldone, en sep el naŭ organizoj, partoprenantaj en la projektoj, estas envolvitaj Esperantistoj. La projekto kontribuas al plua konkreta helpo de la Esperanto-movado al malgrandaj kaj minoritataj lingvoj, kaj al nereakta varbado por Esperanto, ĉar en ĝi inter informoj pri aliaj lingvoj troveblas ankaŭ informoj pri Esperanto. La paĝaro estos preparita en 17 lingvoj, inter kiuj ankaŭ en Esperanto.



2. **Global E-learning** estas projekto kun la celo krei portalon: multlingvan, multmedian kurson pri tutmondaj temoj (angle: “global education”). Ĉefe temos pri ekologio (inkluzive de la lingva ekologio), sed la ĉefa trajto estas konsciigi homojn, kiel interrilatas unuopaj aferoj en la nuna tutmondiganta epoko. Du el la kvar partneroj estas Esperantaj. E@I planas realigi Esperanto-version de la paĝaro.

3. **Speak and Learn** estos poŝtelefona (kaj tabulkomputila) aplikaĵo, ebliganta lerni bazajn esprimojn kaj frazojn en diversaj EU-lingvoj. Planata estas plurplatforma aplikaĵo, kiu funkcios en ĉiuj nunaj operaciumaj sistemoj (Android, iOS, Windows 8). E@I planas aldoni Esperanton inter la elekteleblaj lingvoj.

Apud la novaj EU-projektoj, E@I nun realigas gravan lingvan retejon [www.deutsch.info](http://www.deutsch.info). Estas planataj kursoj de la germana por la niveloj A1, A2 kaj B1; la kerno de la nivelo B1 estos precipe situacioj gravaj por enmigrintoj. Krom tio en la retejo troveblas informoj pri Germanio kaj Aŭstrio kaj pri iliaj kulturoj, troviĝos tie utilaj praktikaj informoj kaj konsiloj pri restado kaj laborado en ambaŭ landoj. La retejo funkcios en naŭ naciaj lingvoj kaj en Esperanto.

Bone funkcias ankaŭ la pasintjare realigita EU-projekto *Slovak Online* ([www.slovak.eu](http://www.slovak.eu)). La retejon vizitis jam pli ol 200 mil unuopaj personoj, ĉiutage vizitas ĝin pli ol mil homoj. Kiel uzantoj registriĝis 5 mil personoj el 170 landoj. La retejo funkcias en ok lingvoj inkluzive de Esperanto.

Estas grave, ke la Eŭropa Komisiono elektis la retejon *Slovak Online* inter la plej bonaj projektoj (“best practise projects”).

Ankaŭ en 2013 E@I lanĉos kelkajn novajn EU-projektojn. Espereble ankaŭ ili kontribuos al pli ofta videbligo de Esperanto en la [ne nur reta] mondo.

Peter Baláž  
E@I-kunordiganto

## Bibliografio pri Sender Silbernik

Lasta-tempe la ĵus mortinta pola aŭtorino Zofia Banet-Fornalowa (1929–2012) publikigis broŝuron pri la bopatro de Zamenhof, Sender Silbernik (1832–1906), okaze de la restarigo de lia tombo-monumento en la Juda Tombejo de Varsovio.

Bedaŭrinde, la verketo tute ne donas plenan bildon pri la personeco de Silbernik nek starigas la genealogion de lia familio. La neglekto similas tiun de la patrino familio de Zamenhof, pri kiu konatas nur la nomo kaj la vivo-datoj de la patrino. Nur malmultaj scias, ke Boris Kotzin, kiu verkis libron pri la ekesto de Ido, estis nepo de Silbernik kaj ke unu filo Silbernik estis konata esperantisto (i. a. ĉefdelegito de UEA) en Usono.

Mi provis listigi almenaŭ la artikolojn aperintajn pri Silbernik kaj estus dankaj por eventualaj kompletigoj.

Ĥavkin, N. B. *Aleksander Silbernik // Esperanto Internacia*, 1946, №10, p. 150-151.

Levite, Max. *Aleksander Silbernik / Tradukis N. B. Ĥavkin. // La Revuo Orienta*, 1956, №8, p. 234-235.

Holzhaus, Adolf. *Aleksander Zilbernik — unua mecenato de Esperanto // Israela Esperantisto*, 1974, №51, p. 5-6.

Holzhaus, Adolf. *Aleksander Zilbernik // Israela Esperantisto*, 1977, №62, p. 6-7.

Holzhaus, Adolf. *Aleksandr Zilbernik // Oomoto*, 1977, julio-decembro, p. 117-118.

Holzhaus, Adolf. *Aleksandr Zilbernik // Revista Portuguesa de Esperanto*, 1979, №29, p. 63-65.

Holzhaus, Adolf. *La gefiloj de A. Silbernik. // Bulgara Esperantisto*, 1982, №6, p. 16. [P. 17: Pranas Sitonis: La domo de A. Zilbernik, kun foto].

Hauptenthal, Reinhard. *Nova teksto de Zamenhof // Dialogo*, 1980, №1, p. 11-14. [Enhavo: faksimilo de letero de Zamenhof de 1906-04-04; nekrologo de Z. el *Lingvo Internacia*, 1906: №8, p. 246-247.]

Golden, Bernard. *Kiel nomiĝis la bopatro de d-ro Zamenhof: S. Silbernik aŭ A. Silbernik // Israela Esperantisto*, 1991, №108, p. 14-16.

Holzhaus, Adolf. *Aleksandro Zilbernik, bopatro de L. Zamenhof // Litova Stelo*, 1992, №3 (85).

Banet-Fornalowa, Zofia. *En la 90-a datreveno de la morto de Aleksandro Silbernik // Heroldo de Esperanto*, 1996, №14, p. 2-3.

Banet-Fornalowa, Zofia. *Familio Silbernik — eminentuloj for de la lumo // Israela Esperantisto*, 2006, №144, p. 3-7.

Ŝilas, Vytautas. *Aleksandro Zilbernik, la unua subtenanto de Lazaro Ludoviko Zamenhof // Litova Stelo*, 2006, №6, p. 9-10.

Banet-Fornalowa, Zofia. *Omaĝe al Aleksandro Silbernik. Warszawa, Łódź: Z. Banet-Fornalowa*, 2012. 40 p.

Reinhard Hauptenthal

**Kvakerismo:** sendogma religio kun radikoj en angla kristanismo, bazita sur la kredo ke ĉiu homo povas sperti rektan inspiron el Dia fonto. Tion ni elserĉas dum silentaj kunvenoj. Konatiĝu kun kvakera pensado historia kaj nuntempa per engrupa reta interskribado pri kvakeraj tekstoj. Ĉiom en Esperanto.

**Kvakera E-Societo:** <http://www.noos.ch/kes/>

**Informoj/aliĝo:** [✉ douglas.esperanto@gmail.com](mailto:douglas.esperanto@gmail.com)

# Ruriko kaj liaj fratoj

## Skizo de Sergio Pokrovskij

### 1150 JAROJN ANTAŬE

1150 jaroj ne estas tre ronda jubileo, tamen la redakcio de LODE decidis omaĝi la datrevenon de evento, per kiu komenciĝas la skribita historio de Ruslando. (Samtempe, en la jaroj 862a/863a, okazis ankoraŭ unu epokfara evento: S-ta Cirilo elpensis slavonan alfabeton; sed pri tio mi jam rakontis en ampleksa ese<sup>1</sup>.)

Laŭ la *Komenca Kroniko*<sup>2</sup>, jeno okazis antaŭ 1150 jaroj en Novgorodo la Granda, en la nordokcidenta Rusio:

#### En la jaro 6370a<sup>3</sup>

Ili [la novgorodanoj] forpelis la varengojn trans la maron, sen doni al ili tributon, kaj komencis meme sin regi; kaj ne estis inter ili justo, kaj leviĝis gento kontraŭ gento, kaj estis ĉe ili tumulto, kaj komencis ili inter si militi. Kaj inter si ili diris:

— Ni serĉu por ni princon, kiu nin regu kaj juĝu laŭ justo.

Kaj ili iris trans la maron al la varengoj, al la rusoj; ĉar tiuj varengoj nomiĝis rusoj, kiel aliaj nomiĝas svedoj, norvegoj, angloj, gotoj — tiel do ĉi tiuj.

Diris al la rusoj la ĉudoj [suom-estona tribo] kaj la slovenoj [orientslava tribo] kaj la kriviĉoj [orientslava tribo] kaj la vepsoj [suom-estona tribo]:

— Nia lando estas granda kaj abunda, sed en ĝi mankas ordo; do venu nin regi kaj estri.

Kaj troviĝis tri fratoj kun siaj parencoj, ili kunprenis ĉiujn rusojn kaj venis: Ruriko, la plej aĝa, sin instalas en Novgorodo, la dua, Sineuso, en Beloozero [malnovrusa urbo en 9a–14a jc], la tria, Truvoro, en Izborsko.

La *Komenca kroniko* estiĝis 250 jarojn post la ĉi-supre raportita evento, en Kievo (do je la distanco 1200 km suden); ne estas mirinda, ke ne ĉiuj detaloj de la rakonto estas fidindaj.

En la rakonto aperas *varengoj* kaj *rusoj*; iuj uzas la vorton sinonime, tamen inter ili estis diferenco.

La varengoj (malnovruse варягы [va'ɾɛgɔ], mezgreke βάρυγγος; en la malfrua norena, *væring*) estis skandina-

vaj aventuruloj kiuj serĉis dungoservon en la orienta Eŭropo kaj Bizancio (M. Vasmer [Fasmer] derivas *varengojn* el la praĝermana *war*, norena *vár* — ĵuro, garantio, fidelo; varengoj estus do “ĵurintoj”). “Varengo” estas profesio, kvankam oni ja parolis pri “la varengaj landoj” (landoj el kiuj devenas varengoj), kaj la Balta maro estis nomata “la Varenga maro”. Okcidente oni preferas la vorton *vikingoj*, tamen tiuj lastaj preferis iom aliajn okupojn.

Alia klarigenda vorto estas “ordo”. La koncerna vorto malnovrusa (нарядъ) certe povis havi la signifon “ordo”, kaj ĝuste tiel ĝi estas interpretata en multaj verkoj, kiel ekzemple en la ŝerca skizo de la rusa historio fare de A.K. Tolstoj<sup>4</sup>, kiun mi citis en la julia numero<sup>4</sup>; sed en la historio de Novgorodo ĝi egale bone povis signifi kontrakton inter la novgorodanoj kaj ilia princo (tiu signifo ankaŭ plu vivas en la moderna rusa lingvo kiel dokumento specifanta komisiitan laboron, “labor-ordono”). Interalie tia kontrakto fojfoje entenis malpermeson al la princo restadi en la urbo sen permeso de la urba estraro.

En la posta historio tiaj kontraktoj ĝenis la sukcesintojn de Ruriko. Post lia morto (869a p.K.) regis lia parenco Olgo (Ольгъ, de la norena *Hæłgi*). Olgo konkeris Sjeverion kaj Kievon (882a p.K.), kiun li faris ĉefurbo de la regno, kaj kie li regis ne estkiel laŭkontrakta dungito, sed laŭ la rajto de konkerito.

### RUSOJ

Kontraste al la varengoj, “rusoj” (русь) normale ne aperas malnovruse en la funkcio de dungitoj; la kronikisto mem ĉi tie prezentas ilin kiel etnon (el kiu devenas la koncernaj *varengoj*). La teorioj, kiuj provas klarigi tiun etnonomon, estas multaj; bedaŭrinde, mankas spaco por prezenti la plej amuzan (“rusoj kiel ursoj” — lingvosciencspeca, sed historie nefidinda) kaj tiun, kiun mi opinias la plej versimila (“rusoj kiel skitoj”) — ĝi estas tro komplikita. Jen du versioj pli simplaj.

#### Rusoj kiel svedoj

Eble tiu etnonomo signifis *svedoj*, kaj estas pruntita el la suomugraj lingvoj (suome *Ruotsi* signifas “Svedio”, *Ruot-*

*salainen* estas “svedo”). Karakteriza estas la sufikso *-b* (malnovruse ĝi sonis kiel mallongega [i]), kiu regule aperas en la nomoj de la suomugraj gentoj, responde al ilia finaĵo *-i*: *suomi* → *сумь*, *vepsoj* → *весьь ktp*; tio sugestas la suoman peradon.

22 jarojn pli frue frankaj kronikistoj notis viziton de “rusoj, kiujn ĉi tie ni nomas normanoj” (*Rusios, quos alio nōs nomine Nordmannos appellamus*<sup>5</sup>). Tamen se temas pri alternativa nomo de la normanoj-vikingoj, iom strangas ke tiun nomon ne konas la kronikistoj, kiuj speciale ĝin glosis.

La etimon de la suoma vorto oni supozas en la norena *Róþsmenn* (aŭ *Róþskarlar*), do “remuloj” aŭ “remistoj”. Oni konjektas, ke krom “la homoj de la *vikoj*”, kiuj navigis sur la maro per velŝipoj, estis aliaj vikingoj, kiuj navigis riverojn per remilaj boatoj.

#### Rusoj kiel danoj

Unu el la malfacilaĵoj de la sveda versio estas, ke la *Komenca kroniko* mencias *svedojn* paralele al la *rusoj*:

tiuj varengoj nomiĝis *rusoj*, kiel **aliaj** nomiĝas *svedoj*, norvegoj, angloj, gotoj ...

Verdire, la kroniko datas de posta epoko, kaj referencas pli malfruajn realaĵojn. Tamen atentindas la nemencio de *danoj*, kaj ĝuste kun dano multaj historiistoj identigas *Rurikon* de la rusaj kronikoj; temas pri Ruriko de Dorestado, princo el la reĝa dinastio Skjoldida de Hedebo.

### KIAL RORIKO?

La norena nomo Hrørek, (aŭ Hrørekr), praĝermana Hrōþirīk(i)az (t. e. “glorriĉa”), latinigata en la kronikoj per *Roric*, *Rorich*, *Rorik* kaj responda al la hispanaj *Rodrigo* / *Ruy* / *Rui*, estis maloftega tiutempe en la Nordo; preskaŭ ĉiuj konataj uzoj rilatas al posta periodo (ekde la 10a jc). La sola tiutempa *Hrørek* konata el la okcidentaj kronikoj estas la indikita skjoldido.

Li naskiĝis iam inter la jaroj 810a kaj 820a; lia patro estis la 9a reĝo de Hedebo. En la jaro 850a Ruriko militakiris la tiam grandan urbon Dorestadon en Frislando, kiun Lotario la 1a devis al li

cedi (kondiĉe ke Roriko kristaniĝos); sed tio ne sufiĉis al Roriko, li militakiris Hedebuon en la 857a kaj prirabis Bremenon en la 859a. Sekve de tio la imperiestro senigis lin je ĉiaj posedaĵoj, kaj nenia plua agado de Roriko estas raportita ĝis la jaro 870a.

Resume, la rusaj kronikoj donas du datojn: la jam menciitan jaron 862an, kaj la jaron 879an, kiam Ruriko mortis. La okcidentaj kronikoj donas pli da datoj pri Roriko:

850: Roriko akiras Dorestadon.

859: Roriko atakas Jutlandan princon Horikon la 2an (Erikon la Idon) kaj aneksas parton da lia lando.

862: Ruriko kaj liaj fratoj venas Novgorodon.

863: vikingoj, tralasitaj de Roriko, leviĝas per Rejno ĝis Ksanteno (*Xanten*).

864: mortas Sineuso kaj Truvoro.

867: Lotario la 2a antaŭtimas militon kontraŭ Roriko, elpelita el Frislando.

870: Roriko alianciĝas al Karolo la Kalva en Nimvegeno.

872: Roriko revasaliĝas al Karolo la Kalva.

873: Roriko vasaliĝas al Ludoviko la Germana.

879: morto de Ruriko.

882: kroniko mencias Rorikon kiel jam mortintan.

Du datoj aperas en la interesa intervalo; tamen ili koncernas ne agojn de Roriko, sed supozojn de la samtempoj pri liaj intencoj. Ekz-e jen la koncerna raporto el *Bertenaj Analoj*:

(867) Inde revertens, hostem ad patriae defensionem per regnum suum indicit quasi contra Nortmannos, putans **Rorigum**, quem incolae, qui *Cokingi* novo nomine dicuntur, a Fresia expulerant, cum auxiliatoribus Danis reverti. [Annales Bertiniani]

(Revenante de tie [de Frankfurto], li [Lotario la 2a] kunvokis militistojn de sia regno, liadire por defendi la patrujon kontraŭ la normanoj, ĉar li antaŭtimis **Rorikon** (kiun la lokanoj, kies nova nomo estas *Kokingoj*, forpelis el Frislando) reveni kun dana helpo.)

## LA FRATOJ

Anstataŭ rekonstrui la norenan formon de la nomoj Синеусъ kaj Труворъ (eblaj konjektoj estus *Signjotr* kaj *Torvald*), kelkaj historiistoj supozis, ke la kronikisto miskomprenis norenan tekston en kiu temis pri “*sine hus*” (sia



domo, t.e. sinekdoĉe “kun siaj familianoj”) kaj “*tru voring*” (kun sia fidela kompanio); sume do “venis Ruriko kun sia familio kaj fidela kompanio”.

Tiu teorio prezentas lingvajn malfacilaĵojn, kaj nun estas preskaŭ tute forlasita; iel ajn, la fratoj havas nenian menciindan rolon en la historio, kaj ilia mencio aspektas kiel tradicia trajto folkloro (kvankam tipe temas pri du fratoj, kiel Romulo kaj Remo ktp). Pli interesa estas frapa koincido de la invita frazo en la Komenca kroniko kun la invita frazo el la “Aĝoj de saksoj” fare de Vidukindo Korveja (*Vidukindus Corbeius: Res Gestae Saxoniarum*):

## NIA LANDO ESTAS GRANDA KAJ ABUNDA...

Cent jarojn post la veno de Ruriko kaj 150 jarojn antaŭ la kompilo de la *Komenca kroniko* Vidukindo tiel rakontis pri invito al saksoj veni kaj regi Britujon en la 5a jc:

Kaj la senditoj [el Britujo] deklaris: Noblaj saksoj, la malfeliĉaj britoj, konsumitaj de senĉesaj invadoj de malamikoj, en sia malespero aŭdinte pri viaj gloraj venkoj, nin sendis al vi por petegi vin ne lasi ilin sen helpo. Grandan, vastan sian landon, je ĉiaj bonaĵoj abundegan, ili pretas submeti al via potenco.

(Et procedentes legati: Optimi, inquit, Saxones, miseri Bretti crebris hostium incursionibus fatigati et admotum contriti, auditis victoriis a vobis magnifice patratris, miserunt nos ad vos, supplicantes ut ab eis vestra auxilia non subtrahatis. Terram latam et spatiosam et omnium rerum copia refertam vestrae mandant ditioni parere.)

Mirinda koincido de la formulo. Eble simpla koincido. Sed eble la tutmondiĝo ne estas tiom nova fenomeno, kiel ni kutime supozas.

## Glosaro

**Hedebu-o:** en la vikinga epoko, la plej grava komerca centro de Danio, en la nuna germania komunumo *Busdorf* en Ŝlesvigo-Holstinio. La esperantigo sekvas la danan *Hedeby* [‘he:ðəby]; aliaj lingvoj plejparte imitas la danan skribon, sed tordas la prononcon. Angle *Hedeby*, germane *Haithabu* kaj *Haddeby*, norene *Heiðabýr*, latine *Heidiba*, ruse Хедэбу.

**kompanio:** mezepoke, grupo da homoj (kelkcent, malpli ol milo), dungigintaj por servi princon en milito, administrado de lia princo kaj de lia persona bieno. Tian grupon ĉe la ĝermanoj Tacito priskribas per la vorto *comitatus*; en la Orienta Eŭropo, kaj precipe en Rusio tiu ĝermo de feŭdismo konserviĝis ĝis la 12a jc. La rusa termino estas дружина; angle kaj france tia kolektiva termino mankas (laŭbezone oni uzas la Tacitan latinaĵon ankaŭ por priskribi la fenomenon mezepokan), siajn terminojn tiuj lingvoj havas por la individuaj kompanianoj (france *antrustions*, malnovangle *þegen*, *thegn*, *gesith*, germane *Ministerialen*).

**noren-a:** rilata al la nordokcidenta (islanda-norvega) branĉo de la ĝermana pralingvo kaj ties mezepoka literaturo (ĝis la 14a jc).

**skjold-id-o:** ano de reĝa dinastio de la danoj, laŭ la nomo de la mita praulo *Skjoldo*. La historion de la skjoldidoj (*Skjöldungar*) rakontas samnoma sagao. Norene *Skjöldung*, angle *Scylding*, ruse Скъельдунг.

**Skjold-o:** filo de Odino kaj mita reĝo de la danoj (laŭvorte la nomo signifas “ŝildo”, la esperanta vorto evidente parencas). Norene *Skjöldr*, latine *Skioldus*; per la nomo *Scyld* lin mencias la malnovangla poemo *Beowulfo*.

## Notoj

1. Pokrovskij S. *Slavonaj skriboj* // LODE, 1998, №12, 1999, №1, 2.

2. La Komenca kroniko (ruse *Начальная летопись* aŭ *Повесть временных лет*) — la plej antikva kroniko de la Kieva Regno (ĉ. 1113 p.K.).

3. La kroniko nombras la jarojn ekde Adamo (vd. pri tio nian studaĵon: *Kristanaj kalendaroj*, LODE, 1998, №1–3), kun jarŝanĝo je la 1a de marto; do, inter la marto 862 p.K. kaj la februaro 863 p.K.

4. Pokrovskij S. *250 jarojn antaŭe* // LODE, 2012, №213, p. 16.

5. Liutprand. *Antapodosis* 1, 11 (kaj simile en *Annales Bertiniani* ĉe la jaro 839a).

продолжительную и усердную службу Заменгофа, отъѣченную, какъ видно изъ представляемаго при семъ формулярнаго о службѣ его списка, , ВЫСОЧАЙШИМИ наградами, имѣю честь покорнѣйше просить Ваше Высокопревосходительство о призна- нии за б.учителемъ Заменгофомъ права на получение пенсiи за его продолжительную службу по вѣдомству Министерства Народнаго Просвѣщенiя.-

Попечитель Округа

*Александр Корженков*

## Mark Zamenhof: Novaj dokumentoj, novaj enigmoj...

### de Aleksander Korĵenkov

Antaŭ 175 jaroj, la 27an de januaro (Gregorie: la 8an de februaro) 1837 en Suwalki (Pola Reĝlando en Ruslanda Imperio) en la familio de Fajba Voljfoviĉ kaj Rajna Percovna Zamenhof naskiĝis Motelj, pli bone konata kiel Mark Fabianoviĉ (Esperante: Marko) Zamenhof, la patro de la aŭtoro de Esperanto. Okaze de ĉi tiu datreveno *La Ondo* aperigas ĉi-jare serion da artikoloj, verkitaj surbaze de dokumentoj trovitaj en bibliotekoj kaj arkivoj.

En la oktobra *Ondo* vi povis konatiĝi kun tri dokumentaroj pri Marko Zamenhof, trovitaj en la Ruslanda Ŝtata Historia Arkivo (ruse РГИА = RGIA) en Peterburgo<sup>1</sup>, kaj ĉi-foje ni daŭrigas la temon. Ni rememoru, ke RGIA estas unu el la plej grandaj kolektejoj de dokumentoj en la mondo. Ĝi enhavas pli ol sep milionojn da dokumentoj. La arkivo estas dividita je pli ol mil fondaĵoj (ruse: фонд), konsistantaj el multegaj fakoj (ruse: опись). En ĉiu fako estas pluraj dokumentaroj (ruse: дело = afero), kiuj konsistas el unu ĝis miloj da dokumentoj, kiuj povas esti unupaĝaj kaj plurcentpaĝaj.

En la fondaĵo №733 estas konservataj 109 mil 823 dokumentaroj de la Ministerio pri Popola Klerigo de Ruslando. La fako №189 de ĉi tiu fondaĵo enhavas 661 aferojn pri porjudaj lernejoj el la jaroj 1863–1881, inter kiuj estas la tri menciitaj “aferoj”<sup>2</sup> pri la patro de Doktoro Esperanto.

Bedaŭrinde, mankas nomindeksto por la fondaĵo №733, kaj ne eblas facile trovi ĉiujn dokumentojn pri iu certa instruisto. Mi do decidis trovi almenaŭ la aferon pri la emeritiĝo de Marko. Dum unu plena labortago mi rigardadis mikrofilmojn de la manskribitaj enhavtabeloj de la pensiiĝaj fakoj, kaj fine mi trovis la fakon №139 kun aferoj pri instruistoj, kiuj emeritiĝis dum 1903–1904. Entute en la fako №139 estas 606 aferoj. La afero №521 havas harstarige pluman titolon:

*Laŭ la pledo de la estro de la Varsovia Lerneja Regiono, Afero pri rekono de la rajto je pensio de la eksa instruisto de la germana lingvo de la Varsovia reala lernejo, Ŝtata Konsilisto Motelj Zamenhof.*

La afero enhavas 14 dokumentojn sur 20 paĝoj. Ni vidu, pri kio temas...

La estro de la Varsovia lerneja regiono Aleksandr Nikolajeviĉ Ŝvarc la 21an de novembro 1903 sendis pledon al la ministro pri popola klerigo, Vladimir Gavriloviĉ Glazov. Li skribis, ke la direktoro de la Varsovia reala lernejo<sup>3</sup> turnis sin al li

... por asigni al la eksa instruisto de la germana lingvo en la paralelaj fakoj de la nomita lernejo, Ŝtata Konsilisto, judismano Motelj /Mark/ Zamenhof, emeritan pension pro lia 35-jara ŝtata servado en la ofico instruista, en la plena sumo de lia plej granda jarsalajro, pagita al li en lia ofico, t. e. po 900 rublojn dum jaro.<sup>4</sup>

Tamen Ŝvarc frontis problemon, ĉar Zamenhof ne havis formalan rajton je la ŝtata pensio. Kiel ni scias el lia ofica listo<sup>5</sup>, en 1858 li plenumis en la Grodna gubernia instruista komisiono ekzamenon por la ofico de instruisto en ŝtataj porjudaj lernejoj, kaj en 1875 li sukcese ekzameniĝis en la historia-filologia fakultato de la Imperiestra Varsovia Universitato kaj ricevis la rajton instrui la germana lingvon en ŝtataj gimnazioj kaj aliaj lernejoj<sup>6</sup>. Sed instruarjta atestilo ne sufiĉis por pensio. En la teritorio de la Pola Reĝlando estis regulo, ke la judaj instruistoj por ricevi ŝtatan pension devis havi universitatan diplomon. Tiun M. F. Zamenhof neniam ricevis.

Malgraŭ tio Ŝvarc, emfazinte, ke

Zamenhof dum sia tuta servado en la Varsovia lerneja regiono estis konsiderata kiel uzanto de ĉiuj rajtoj de la servado, estis promociita en la rangtabelo ĝis la Ŝtata Konsilisto <...> kaj konsiderante la longan kaj fervoran ŝtatan servadon de Zamenhof, kiu estis rekompenĉita ... per Imperiestraj ordenoj<sup>7</sup>

petis la ministron rekonii la rajton de Zamenhof je pensio en la sumo egala al lia lasta salajro, t. e. 900 rubloj jare.

La kleriga ministerio subtenis la peton de la estro de la Varsovia lerneja distrikto kaj la 6an de decembro 1903 petis la financon ministerion asigni pension al Zamenhof<sup>8</sup>.

La 7an de julio 1904 la vicministro de la financa ministerio, Miĥail Dmitrijeviĉ Dmitrijev, sciigis la klerigministron, ke la financa ministerio interkonsente kun la departemento pri la ŝtata kontrolo<sup>9</sup> proponis al la emerita komisiono de la gubernioj de la Pola Reĝlando asigni pension al Zamenhof, malgraŭ ties aparteno al la juda religio<sup>10</sup>.

La 16an de julio la financa ministerio sendis al Ŝvarc informon<sup>11</sup> pri ĉi tiu decido.

La proceduro moviĝis malrapide, sed evidentiĝis, ke iu tre atente sekvas ĝin.

Ĉi tiu atenta interesato estis Sumer Davidoviĉ Goldljust, loĝanta en la Varsovia strato Dolgaja 18. La 5an de novembro 1904 li sendis al la kleriga ministerio peton, kiu sciigas al ni fakton ĝis nun nekonitan. Jen la teksto (en kiu mi korektis la plej krudajn mallogikaĵojn kaj erarojn):

«Peto

Ĉi-kune mi kunsendas pagordonon, donitan la 16an de februaro 1890 de la Varsovia komerca juĝejo kun №342 por la akuzito Marko Zamenhof, loĝanta en Varsovio.

La akuzito Marko Zamenhof ĝis la komenco de la 1904a jaro servis kiel instruisto en la Varsovia reala lernejo, kaj surbaze de la salajro, kiun li tie ricevis, mi ĝis nun partoprenis en divido, fare de la Varsovia komerca juĝejo, de lia salajro inter liaj kreditoroj. Sed ekde la nuna 1904a jaro, la supre menciita Marko Zamenhof ekŝiĝis. En la pensia fako de la Varsovia fisko estas neniu mono por li.

Pro tio, mi havas la honoron tre humile peti vian Altan Generalan Moŝton:

1. Se ĉi tiu Marko Zamenhof nun ricevas pension, reteni ĝin surbaze de la kunsendata pagordono;

2. (a) kaj se la nomito nun ricevas neniun pension, (b) aŭ se ĉi tiu kazo apartenas al alia Ministerio, resendi la pagordonon al mi kun mencio de la loko, al kiu mi adresu min».<sup>12</sup>

Bedaŭrinde, la serĉado de la arkivo de la Varsovia komerca juĝejo ne estis sukcesa, kaj do dume ne estas eble konatiĝi kun la dokumento №342 de la nomita juĝejo. Estas evidente, ke la monpuno, ricevita de Zamenhof estis tre alta — ja eĉ lia konstanta pagado dum pli ol 13 jaroj ne sufiĉis por kovri la pagandan sumon. Kiun delikton li faris? Kiam la juĝejo komencis esplori la kazon? Kiom Zamenhof devis pagi? Ĉu pro ĉi tiu kazo lia filo Ludoviko skribis: “En la fino de 1889 ni restis sen kopeko!”<sup>13</sup>. Nova fakto. Kaj novaj enigmoj...

Alia novaĵo en la supra peto de Goldljust estas la nomo de nia protagonisto. Al la pli frue uzataj Mordeĥaj, Motelj, Mordĥe, Mordka, Mark, Markus (kaj aliaj eventualaj formoj) ĉi tie aldoniĝas Marko — ruse Марко. Tute identa kun la Esperanta nomformo!

Ni plufoliumu la aferon.

La kleriga ministerio pritraktis la aferon, kaj la 4an de decembro 1904 ĝi plusendis al Ŝvarc kaj al la estro de la Varsovia polico, barono Karl Stepanoviĉ Noljaĵen, la peton de Goldljust kaj akompanajn leterojn<sup>14</sup> por laŭleĝe aranĝi pagadon el la pensio de Zamenhof al Goldljust.

Ŝvarc, ricevinte la leteron, esploris la kazon kaj respondis al la ministerio, ke Motel (Mark) Zamenhof dume ne ricevas pension, ĉar ankoraŭ ne estas klarigitaj liaj rajtoj por pensio dum lia laboro en elementaj lernejoj de la Vilna lerneja regiono, kaj do ne estas eble preni monon el lia pensio<sup>15</sup>. La kleriga ministerio la 31an de januaro 1905 sendis al barono Noljaĵen klarigan leteron<sup>16</sup> kaj la pagordonon de la juĝejo por redono al Goldljust. Ve, ĉi tiu pagordono same kiel la kompleta servolisto de Mark Fabianoviĉ Zamenhof, pli frue resendita al Varsovio, verŝajne, malaperis dum la Dua mondmilito.

Aŭ eble ĝi ŝimas en iu neatendita loko?

Ĉu troviĝos pliaj dokumentoj pri Zamenhofoj? Nu, se ili troviĝos, tio okazos ne per si mem, sed nur se iu persiste serĉos ilin...

## Referencoj kaj notoj

1. Korĵenkov A. *Tri dokumentoj pri Marko Zamenhof // La Ondo de Esperanto*, 2012, №10, p. 18–21.

2. РГИА, ф. 733, оп. 189, д. 54, 160, 492.

3. Tiam la direktoro de la Varsovia reala lernejo estis princo Konstantin Moisejeviĉ Argutinskij-Dolgorukov, filo de generalo Moisej Zaĥaroviĉ Argutinskij-Dolgorukov, armeno, heroo de la Kaŭkaza milito (1817–1864) kaj pranepo de la fama Jozefo, Katolikoso (= Patriarko) de ĉiuj armenoj. Same kiel Marko Zamenhof, K. M. Argutinskij-Dolgorukov estis ŝtata konsilisto.

4. РГИА, ф. 733, оп. 139, д. 521, л. 1.

5. РГИА, ф. 776, оп. 20, д. 582, л. 3–7.

6. Legu pli en la artikolo: Korĵenkov A. *Mark Fabianoviĉ Zamenhof, instruisto en ŝtataj lernejoj // La Ondo de Esperanto*, 2010, №3, p. 3–6.

7. РГИА, ф. 733, оп. 139, д. 521, л. 2.

8. РГИА, ф. 733, оп. 139, д. 521, л. 3–5.

9. Ĉi tiu departemento (Государственный Контроль) estis speciala organo ĉe la Konsilio de ministroj. Ĝia tasko estis kontrolado de la ŝtata buĝeto kaj de la buĝetoj de la ministerioj. Tiutempe ĝin gvidis generalo Pavel Ljvoviĉ Lobko.

10. РГИА, ф. 733, оп. 139, д. 521, л. 6.

11. РГИА, ф. 733, оп. 139, д. 521, л. 7.


12. РГИА, ф. 733, оп. 139, д. 521, л. 8.

13. Zamenhof L. *Mi estas homo*. Kaliningrado: Sezonoj, 2006, p. 104.

14. РГИА, ф. 733, оп. 139, д. 521, л. 10, л. 11.

15. РГИА, ф. 733, оп. 139, д. 521, л. 12.

16. РГИА, ф. 733, оп. 139, д. 521, л. 14.



## Mao Zifu

Al Mao Zifu (1963), kiu fermas la ĉi-jaran serion de *La Ondo* pri niaj plej elstaraj poetoj, ni omaĝas per papere premiera aperigo<sup>1</sup> de recenzo, kiun en 2007 Marc van Oostendorp verkis por sia lego-blogo en la nederlanda<sup>2</sup>.

Ĝin tradukis István Ertl.

«Iam, antaŭ pli ol dudek kvin jaroj, mi aĝis dek tri jarojn kaj legis libreton kun la titolo *Esperanto: Ĉu utopio aŭ realo?* Tio instigis min lerni Esperanton, kaj mi neniam plu liberiĝis de tiu lingvo. Unu el la rakontoj en tiu libreto kiuj tiam fascinis min temis pri disidentaj ĉinaj poetoj, kiuj en prizono daŭre verkis, sur neceseja papero, poemojn en Esperanto, kiuj estis poste kontrabanditaj el la malliberejo.

Mi ne plu legas tiel multe en Esperanto, kiel konstateble ankaŭ el miaj raportoj en ĉi tiu retejo, sed la sensacian aperaĵon de la lasta jaro mi ĵus tamen legis: volumon de ĉino kiu ne laŭlitere sidas en prizono, tamen ja estas fermita en sia korpo.

Mao Zifu naskiĝis en 1963, “en fora vilaĝo”, kiel li diras en *Skizo de la aŭtoro* komence de tiu ĉi volumo. Li studis matematikon, iĝis instruisto kaj iom sukcesa atleto, kiam en 1985 li estis akcidente trafita de traktoro kaj iĝis komplete paralizita. De tiam li fariĝis pensiulo, kaj en 1986 li lernis Esperanton — kvin jarojn post mia lerno. Kaj nun li publikigis dikan poemaron, la plej potencaĵon kiun mi iam ajn legis en tiu lingvo, *kantoj de anteo*.

Mi trovas *kantoj* multe pli bona ol, ekzemple, *La Infana Raso* de la lastjare



forpasinta William Auld. Ĉi lastan volumon mi taksas pli kiel iom malfortan reagon al T.S. Eliot, kvazaŭ *Waste Land* kun iom pli optimisma, esperantisma mesaĝo, verkita tute en la moderna stilo de la frua dudeka jarcento.

Ĉio estas pli interesa ĉe Zifu: la temaro, multe pli profunda, foje pli sovaĝa, pli despera, kaj feliĉe ne multe rilata al la Esperanto-ideologio, ja malmulte poezia. Kaj precipas ankaŭ la tono, la stilo, kiuj ĝuste havas multon por fari kun la internacieco de Esperanto. Senprobleme la poeto saltas de okcidentaj troĥeoj al japane hajkecaj versoj, de la greka mitaro (Anteo) al hindua filozofio, de libera verso al rimo. Krome li abunde uzas la eblojn de la lingvo; en ĉiuj recenzoj kiujn mi legis pri la libro, la recenzantoj raportas ke iujn vortojn ili devis serĉi en vortaroj. El tio foje rezultas mirindaj tekstoj, kiuj, se kompari al iu el la nederlanda poezio, plej proksimas al Leo Vroman:

aj  
faja  
majo  
pagajo  
en havaja  
kajo

feto gaja  
ĉe baj...baj  
sonĝe rampas sur himalajon  
vidas tamen, najo  
voras kobajon  
rajo  
fracojn  
samurajo  
sipajon  
kia kamajo!  
ho, jesajo,  
kie idilio arkaja?

Tiom kosmopolita vizio el tiom prizonita korpo, verkita en internacia lingvo kiun preskaŭ neniu parolas: ĉu eblas io pli korskua?»

Marc van Oostendorp»

Sed kiu estas, biografie, nia poeto, “la neniam venkebla venkito” (Miguel Fernández)? Mao Zifu sin prezentas en la supre aludita *Skizo de la aŭtoro* (vidu ĝin ĉi-paĝe en la liva subo).

Kaj staru, fine, poemo ĉu-membio-grafia.

### naskiĝloko

mi suferis je ĉiuj malsanoj,  
nur krom nostalgio.  
kvankam en sia man-etendo,  
tiom da jaroj ekster mi la loko.

tamen ĉe kaplevo  
mi ĉiam vidis:  
floroj mortis de sunfajro,  
arboj falis de inundo.  
nudaj virinoj ŝarĝatas  
per idoj kaj ŝtonoj;  
virojn sin distras bubaj  
spektante hundparan koiton,  
kaj militon de bovoj.

mi suferas je nostalgio,  
krom korpaj malsanoj.  
sur ĉi lokon, mi ektrovas:  
la vilaĝanoj duelas por orero.

mi volus aĉeti ridon  
de kuzinoj per pensio tutjara.  
mian nealtan rangon regalas  
ĥoro per dancoj sur la manoj...

Kunmetis: István Ertl

### Skizo de la aŭtoro

Naskiĝo en 14jan1963, en fora vilaĝo.

Ludiloj grunda kaj ŝtona. Nutraĵoj hordea, napa kaj batata. Sorto.

Studento en la normala universitato de la provinco Hunan, Ĉinio, intertempe, flugpilka teamano de la fakultato pri matematiko, dum sept1980-jul1984.

Sen groŝo en la poŝo, ofta promenanto kun samĉambranoj de la monto al la strando ĉirkaŭ la universitato. Fortuno.

Instruistiĝo en sept1984 ĉe mezgradfaka lernejo.

Permesita perspektivo antaŭ la mano. Destino.

Paraliziĝo je 23mar1985 danke al traktoro-stiristo samaĝa kiel mi.

Juneco kaj revo krevis en momento. Fatalo.

Pensiulo ekde okt1985.

Mortanto vivanta. Reziĝnacio.

Esperantisto en la ĉelo de post 1986. Providenco.

Celibulo por ĉiam ne pro religio; libercredanto pri la religioj orientaj kaj okcidentaj. Scivolemo.

Verkisto/versisto. Tempopasigo.

Membreco en Esperantlingva Verkista Asocio ekde okt1997. Taŭĝo?

Sola jam ne izolita. Komputilo — kunulino neniam perfida. Saŭdado.

1. Rete legebla: <http://www.everk.it/index.php?id=21,142,0,0,1,0>

2 <http://marc-las.blogspot.com/2007/05/mao-zifu-kantoj-de-anteo-novjorko-new.html>

Ne forgesu  
(re)aboni



## The white man's burden?

Steele, Trevor. *Flugi kun kakatuoj*: Romano. — Antverpeno: FEL, 2010. — 254 p.

Trevor Steele en siaj romanoj ofte traktas akrajn sociajn kaj historiajn temojn, sen mildigo aŭ plibeligo. Ĉi-foje temas pri koloniado de Aŭstralio fine de la 19a jarcento, kun akuta konflikto, milito inter la civilizoj eŭropa kaj aborigena.

Tragedio estas en tio, ke ĉiu siaflanke pravus, almenaŭ sincere opinias sin prava. Britoj kredas, ke ili disvastigas civilizon tra la mondo, indiĝenoj defendas sian kutiman vivmanieron — alian ili ne imagas. Funkciuloj el Londono ordonas trakti nigrulojn humane, loka polico kaj bienposedantoj scias, ke tio ne eblas, se oni celas plu vivi en la setlejo. Jen loka moŝtulo demandas publike: “Ĉu la tero apartenas al ni, kiuj tenas ĝin laŭ brita leĝo kaj produktas lanon kaj viandon, aŭ al sovaĝuloj, kiuj nenion utilan faras per la tero?” (p. 65)


La ĉefa heroo, juna aborigeno Jangabara, estas multtalenta kaj pensema. Li ne volas blinde obei antikvajn tabuojn — ĉar ne ricevis respondon, *kial* oni obeu — kaj pro tio li estis forpelita de sia tribo. Li provas vivi kaj labori ĉe blankuloj, lernas rajdi, pafi per fusilo, paroli angle...

Juna anglo Billy Dixon, iom naiva, strebas al bonstato. Komence li kun aliaj aventuremuloj provas serĉi oron — sen granda sukceso. Poste li eklaboras ĉe bieno, kaj tie konatiĝas, eĉ amikiĝas kun Jangabara. Billy rakontas al li pri diversaj landoj, pri vivo de eŭropanoj, legas al li librojn. Jangabara foje eĉ savas vivon de la facilanime nesingarda Billy, kaj kiam ties esperita “fianĉino” evidentiĝis ruza putino, trompinta multajn virojn kaj fuĝinta kun ilia mono — Jangabara eĉ instigas sian amikinion (fakte, edzinon) sekse konsoli la deprimitan Billy...

Iliaj dialogoj tuj memorigas pecojn el *Vojaĝo al Kazohinio*. Oni same facile rimarkas deflanke, kiom konvenciaj kaj mallogikaj estas la eŭropaj “valoroj”, la bazo de tuta eŭropa kulturo.

“Billy, kial vi uloj volas tiom da tero? Kie estas ostoj de viaj antaŭuloj? Kie estas viaj sanktaj lokoj? En via hejmo aŭ...” li gestis al la ruĝaj areoj sur la mapo, “aŭ alia loko?”

<...> “ĉe ni ne plu gravas la loko, kie kuŝas la ostoj de la antaŭuloj. Kaj ni



ne bezonas sanktajn lokojn. Ni povas fari hejmon ie ajn.”

“Sed... se aliaj uloj havas hejmon tie, kiel vi povas?” (p. 92)

... Strangaj homoj, tiuj angloj. Volis havi ĉies teron, sed evidente ne havis ligojn eĉ kun la propra. (p. 94)

Mi iom parolis al Jangabara pri la or-febra fenomeno. Li skuis la kapon: vi angloj estas ja strangeĝaj, li diris. Kial tiu speco de ŝtono (mi devis instrui al li la vorton metalo) igas vin kuri kiel frenzuloj en dezerton? Ĉu vi povas ĝin manĝi aŭ trinki? Ĉu ĝi plibonigas vian amoradon? (p. 98)

La blankuloj havis tiun strangan koncepton mono. Jangabara povus kompreni, se ili volus havi pli da manĝaĵoj, pli da virinoj, senlaboraj tagoj, vestoj, tabako... sed mono? Iam Billy diris ŝerce, ke mono estas ciferoj en libro en banko. Tio klarigis nenion al Jangabara. (p. 143)

... se la klimato estas tia ĉi, kial ni ne simple redonu la teron al la nigruloj kaj reiru al nia propra lando? Nu jes, sed kial ni entute havas imperion? La imperio estas historia necesaĵo. Ĝi alportas multan bonon al la mondo. Kiel angloj rezignu pri sia glora historia rolo? Tiel devas esti, kaj iom da ŝvitado estas la kosto. (p.162–163)

Tamen, ne eblas vera amikeco inter blankulo kaj aborigeno. Kaj kiam Jangabara devas fari malfacilan elekton — ĉu plu agi por blankuloj, kie li faras jam karieron (sed certe li neniam iĝus egala al blankuloj) — aŭ reveni al sia popolo, protekti ties teron kaj la vivon mem — li

elektas reveni. Kaj li eĉ mortigas sian ŝajnamikon, kiu tro fidis la “civiliziĝon” de Jangabara. Mortigas ne volonte, sed Billy intertempe pro kreskanta mon-avido pli kaj pli perdas siajn bonajn trajtojn...

Ne eblas konscii (almenaŭ ĝis lastaj ĉapitroj) — kiel en aliaj primilitaj verkoj, ke jen tiu flanko estas “nia”, kaj la alia — “fremda”. Nur en la fino ĉio plene evidentiĝas... “ili memoru, ke ili batalas por sia sola hejmo, dum la blankuloj batalas por forrabi la teron de aliaj homoj, do la Banubi havos pli puran motivon.” (p. 236)

Jangabara revenas al sia popolo, iĝas la gvidanto kaj admirata heroo. Li instruas samtribanojn pafi kaj rajdi, nun ili ofte venkas la blankajn invadintojn.

Kaj la milito inter la civilizoj plu daŭras. Sed la fortoj ne egalas. Nigruloj murdas kelkajn blankulojn, blankuloj murdas multoble pli da nigruloj. Kaj Jangabara ŝanĝas la taktikon: li sola kaŝe atakas bienojn kaj policejojn, lasante spurojn, pruvante ke li povas fari ion ajn; liaj helpantoj disvastigas falsajn informojn pri liaj planoj... Blankaj policistoj furiozas pro sia senpovo.

Sed Jangabara estas tro naiva pri homaj interrilatoj, li kredas, ke ĉiuj nigruloj estas solidaraj kontraŭ blankula agreso — do li ne distingis perfidulon en sia “adoptita frato” Macky. Tio fine kaŭzas lian malvenkon kaj pereon.

La libro estas verkita per bonega lingvaĵo, sen troaj neologismoj (kelkaj specialaj vortoj, kvankam neglositaj, bone kompreneblas el kunteksto). Rimarkindas kelkaj freŝaj kaj trafaj esprimoj: “oldfraŭlinaj viroj” (t. e. tro molkarakteraj, timemaj, nedecidemaj); “rajdis grupo”; “neamika, ‘mi-estas-via-ĉefo’-tono”; “la [neŝlosita] seruro... forblufus tiun homon”. Fuŝa angla lingvo, parolata de aborigenoj, estas transdonita sprite kaj konvinke.

Trevor Steele priskribas la realon tia, kia ĝi estis — ne evitante krudajn, iam eĉ naŭzigajn detalojn. La libro celas ne ŝatantojn de amromanoj, sed pensemajn homojn kun firmaj nervoj. Kun la rezonoj en la epilogo — pri “superaj” kaj “malsuperaj” raso, pri ebla estonta cedo de brita civilizo al iu alia — oni povas konsenti aŭ ne, sed oni nepre pensos. Ankaŭ pri esenco de kapitalismo kaj imperiismo, pri kaŭzoj por nuna “tutmondeco” de la (plejparte fuŝa) angla lingvo, pri evoluo de moralo kaj multo plia. Legu kaj pensu...

Valentin Melnikov

## La amo ja ekzistas!



**Manüel. Ĉu plu ekzistas amo?: KD. — Udine: Rovere Emanuele, 2012.**

Jen la dua albumo de Emanuele Rovere, kies antaŭa debuta disko *Duono voĉe... tutkore* impresis min tre freŝe kaj kolektis faskon da favoraj recenzoj. Same kiel la antaŭa albumo, tiu ĉi prezentas aron da diverslingvaj popularaj kantoj adaptitaj al Esperanto. Aldone, en tiu ĉi albumo la aŭtoro kuraĝis prezenti ankaŭ kelkajn proprajn komponaĵojn.

La ĝeneralaj enhavo kaj sono restis la samaj: dominas helaj kaj tre melodiaz kantoj, multaj el kiuj estas monde konataj ŝlagroj (ekzemple, *Io stulta*, kiu estas adapto de *Somethin' Stupid* fare de Clarence Carson Parks, aŭ *Hieraŭ mi* — adapto de *Yesterday* fare de *The Beatles*). La muzik-aranĝoj estas same riĉaj, harmoniaj kaj sufiĉe variaj. La kantado de la artisto (kiu ja avertas, ke lia “nuna voĉo estas nur pala ombro de la iama”), miaimprese, eĉ riĉiĝis kaj fortiĝis kompare kun la antaŭa albumo. La prononco daŭre estas tre klara; ankaŭ la kvalito de la tekstoj malgraŭ ilia relativa simpleco estas sufiĉe alta, kvankam la aŭtoro (kiu samtempe rolis kiel tradukinto de ĉiuj tekstoj) evidente traktas la originalajn vortojn sufiĉe libere, almenaŭ la adapto de *Yesterday* tekste realiĝis ne kiel traduko, sed kiel pli-malpli memstara artaĵo inspirita de la originalo. Ankaŭ la temaro de la kantoj restis la sama: krom en la lasta kanto ili ĉiuj temas pri la amo (kaj tiu lasta, titolita *Auschwitz* kaj temanta pri pacismo kaj tutmonda frateco, bone resumas la mondpercepton de la aŭtoro kaj traŭne kronas la diskon).

Novaĵo en tiu ĉi albumo iĝis tri originalaj kantoj, komponitaj de Emanuele mem. Sone, tekste kaj melodie ili tre proksimas al la ĝenerala stilo de la albumo kaj sonas sufiĉe bele, kvankam laŭ la kvalito ili antaŭvideble ne povas

digne konkurenci kun la famegaj ŝlagroj, kiuj tamen restas la esenco de la disko.

La diskon akompanas tekstolibreto; la karaokeaj versioj de la kantoj ĉi-foje, bedaŭrinde, ne aperas.

Paroli pri la mankoj de la diversrilate interesa kaj bonsona albumo estas malfacile, sed mi nepre devas plendi, ke en multaj kantoj la voĉo de la kantisto ŝajnas esti ne sufiĉe laŭta (verŝajne dum studia miksado oni iel trosurdigis la voĉ-trakon). Ankaŭ la elekto de la kantoj ĉi-foje rezultigis iom malpli brilan kolekton kompare kun tiu, kiu estis prezentita en la debuta albumo. Sed tiu ĉi opinio estas, kompreneble, plej subjektiva.

Ĉiuokaze, *Ĉu plu ekzistas amo?* certe iĝis inda posteulo de la antaŭa albumo kaj mi sincere rekomendas ĝin al ĉiuj ŝatantoj de belaj melodioj kaj sincera kantado.


**Paŭlo Moĵajev**

## Nova libro pri Zamenhof

**Żelazny, Walter. Ludwik Zamenhof. Życie i dzieło. Recepcja i reminiscencje. Wybór pism i listów. — Kraków: Nomos, 2012. — 292 paĝoj.**

Antaŭ nelonge en Krakovo aperis la longe atendita pollingva libro de profesoro Walter Żelazny *Ludwik Zamenhof: La vivo kaj verko. Percepto kaj komentarioj. Elektitaj tekstoj kaj leteroj*.

La pollingva libro de Walter Żelazny sekvas la esperant-lingvan libron de Aleksander Korĵenkov *Homarano* (2009, 2a eldono 2011) kaj la german-lingvan libron de Andreas Künzli *L. L.*



*Zamenhof (1859–1917). Esperanto, Hillelismus (Homaranismus) und die „jüdische Frage“ in Ost- und Westeuropa* (2010). Ĉi tiuj tri gravaj zamenhofologiaj verkoj aperis inter la du jubileoj: la 150-jariĝo de Zamenhof en 2009 kaj la 125-jariĝo de Esperanto en 2012.

Ĉi-sube estas resumo de la libro de Żelazny, kopiita el la libro mem.

«Kontraŭe al la judoj, kiuj serĉis la fontojn de la antisemitismo ekstere, Zamenhof (1859–1917) vidis ĝin en la judaro mem. Laŭ li judismo devas sin reformi por ne esti la kaŭzo de konfliktoj tie, kie judoj loĝas. Zamenhof surbaze de la Haskala lanĉas propran programon de la reformo kiun li nomas Hillelismo. Kiam li rimarkis, ke la judaro ne sekvas ĝin li ŝanĝas la strategion, forĵetas sian alvokon direktitan al judoj kaj turnas sin al ĉiuj homoj de la bona volo kun la nova mesaĝo, kiun li nomas Homaranismo.

Ĉiuj homoj estas liberaj, kaj rajtas konservi proprajn lingvajn kaj etnajn radikojn — kaj ĉio ĉi estas kontraŭa al la epoka renaskiĝo de la nacionalismo, kiu kaŝas sin sub la vokfrazoj de la Franca Revolucio, kiu proklamas unuecon de la nacio kaj ŝtato.

Laŭ Zamenhof nova soci-politika ordo devas esti garantiita far’ de la principo de *ius sermonis*, tio estas per la uzo de la lingvo Esperanto, kiu neŭtraligas etnajn, lingvajn kaj naciajn diferencojn, do kaŭzojn de konfliktoj de la eŭropaj popoloj.

Esperanto estis tre proksima venki en Ligo de Nacioj en 1922, sed ĝin haltigis la franca diplomatio, kiu mem post duono de la jarcento perdas en la konkurenco kun la angla, ne permesante fari la novan “mutacion” en la internaciaj lingvaj rilatoj.

Esperanto estas la plej facile lernebla lingvo, estas socie funkcia kaj pri ties populareco ne decidas faktoroj kulturaj kaj lingvistikaj, sed nur politikaj kaj financaj

Sendube Esperanto ĝuas la simpatian de multaj lingvistoj, posedas en la mondo milionojn da parolantoj kaj simpatiantojn kaj kreis certan tipon de la literatura kulturo. Ĉion ĉi oni sukcesis krei dum la unua jarcento de ties ekzisto. Tio ĉi estas multe, tre multe de la vidpunkto de la “vivo” de lingvo. Ĉiu alia lingvo en similaj cirkonstancoj, subpremata de psika premo sen ŝtata mecenato, sen jura protektado, subvencioj, malaperas, Esperanto vivas.»

## Sukcese kribita esearo

**Pri homoj kaj verkoj: Esoj pri la Esperanto-kulturo / Redaktis Michela Lipari, Humphrey Tonkin; Enkonduko de Humphrey Tonkin; Postparolo de Nicola Minnaja. — Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2012. — 143 p.**

Privata kuriero rekte el la Hanoja UK kunportis al mi freŝan eldonaĵon de UEA, redaktitan de Michela Lipari kaj Humphrey Tonkin. La esojj pri la Esperanto-kulturo *Pri homoj kaj verkoj* tuj surgenuigis min. Esperantistoj ne tro entuziasme enprofundiĝas en la literaturon de la Zamenhofa lingvo. Lastatempe japanoj entreprenis ion pozitivan kaj fekundan tiurilate por stimuli beletran utiligadon.

Jen estas taŭga gvidilo por ĉiuj gesamideanoj — ankaŭ al komencantoj. Konvena longeco efike stimulas legemon. Carmel Mallia (1929-) el la mediteranea insulo Malto en sia kontribuado interese kaj el nova vidpunkto prezentis kaj analizis la konatan poemon *La Vojo* de Zamenhof. Tiaj tekstoj facile forigas barilojn, kiuj kelkfoje povas bremsi legemon pri poeziaĵoj.

Lena Karpunina (1963-), rusino el Taĝikio, kiu nun vivas en Germanio, elektis interesan titolon por sia eseo: “Ni ne entombigu niajn literaturajn trezorojn”. Ŝi mem aperigis du librojn: *La Bato* kaj *Neokazinta amo* ĉe la Flandra Esperanto-ligo. Trafajn argumentojn ŝi notas pri eldonado en Esperantujo kaj nelegemo de esperantistoj. Iom kaprice agadas iuj eldonistoj, kiuj tute hazarde elektas presotajn librojn. Grandioza escepto estas hispano Régulo Pérez sur la insulo Tenerifo. Inter la jaroj 1952 kaj 1975 aperis sub la marko *Stafeto* entute 94 libroj. Tiaj geniaj eldonistoj naskiĝas ne ofte, eble unufoje en jarcento, — konstatas Lena Karpunina. Unu kaŭzo por la nelegemo de esperantistoj estas, ke oni ne instruas ĝian literaturon aŭ faras tion tre malofte. Tamen Vilmos Benczik kaj William Auld siatempe multon faris ĉi-kampe.

Pri la periodoj de la Esperanta literaturo skribis Jukka Pietiläinen kaj Geoffrey Sutton. Jam en la jaro 1984 William Auld prezentis kvar tempajn stadiojn literaturajn en la *Esperanta Antologio*, kaj nur heziteme li algulis por ili jenajn etiketojn: 1. Primitiva romantismo; 2. Matura romantismo; 3. Parnasismo; 4. Postparnasismo. Jukka Pietiläinen (1966-) prezentas mejloŝtonajn erojn el



la centjara periodo 1887–1987 kaj demandas, ĉu jam antaŭvideblas la komenco de la kvina periodo. La iamaj antologioj ne ampleksis prozon, kiun devus inkluzivi novaj kolektoj. Tial la nomo de la kvina kolekto devus esti pli vasta. Geoffrey Sutton (1947-) faras

pripensindan proponon tiurilate: “5. Eksperimenta poezio kaj Popularigo de la romano”. Ni ja konas gigantan literaturan enciklopedion de Sutton, eldonitan de *Mondial* anglalingve en Novjorko (2008).

Necesas ankoraŭ mencii Sten Johansson (1950-), kiu multflanke kaj rave prezentis la konatan svedan verkiston kaj tradukiston Stellan Engholm (1899–1960). La alia eseo de Johansson kun la titolo *Bohemia amoro — Karolo Piĉ kaj Eli Urbanová* sidigis min sub la noktan legolampon per forta altiro. Lakone mi konstatas: indas ekkonatiĝi. Mi rekomendas.

Tuj post la tralego de la nova literatura verko de UEA mi mendis rekte el Malto kelkajn publikajojn de Carmel Mallia. Komprenoble ankaŭ la Libroservo ĉe UEA en Roterdamo tiucele helpas. Tre sincere kaj dankeme mi manpremas al la respondeculoj de la Universala Esperanto-Asocio pro tio, ke maljuna veterano danke al la libro *Pri homoj kaj verkoj* entuziasmiĝis kaj plivigliĝis. Mirinde efikis ĉi tiu 143-paĝa perleto.

**Jorma Ahomäki**

### Forpasis Laŭlum (1923-2012)

La 10an de novembro 2012 forpasis eminenta ĉina esperantisto **Li Shijun**, internacie konata kiel Laŭlum.

Li Shijun naskiĝis la 29an de marto 1923 en kampara familio en la provinco Hebei, sed en junaĝo devis forlasi sian hejmon pro la invado de la japana armeo. Li laboris kiel ĵurnalisto kaj instruisto de la lingvoj ĉina, angla kaj Esperanto en mezaj kaj superaj lernejoj.



Kun Esperanto li konatiĝis en 1939 per broŝuro kaj en 1940 aliĝis al korespondanda kurso. Post unu jaro li ekpartoprenis la movadon, propagandante kaj instruante la lingvon. En majo 1950 li iĝis unu el la tri dungitoj de la ĵus fondita revuo *El Popola Ĉinio*. Danke al siaj kapabloj li poste fariĝis vicĉefredaktoro de *El Popola Ĉinio*, de *La Mondo* kaj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo, prezidanto de la Ĉina Esperanto-Instituto. Li emeritiĝis en 1989.

Li elĉinigis plurajn verkojn politikajn kaj porinfanajn, sed plej grandan rekonon li ricevis pro tradukoj de ĉinaj beletraĵoj, inter kiuj estas tri el la kvar “ĉinaj klasikaj romanoj”: *Romano pri la tri regnoj* (Luo Guanzhong), *Ĉe Akvorando* (klasika romano, kutime atribuita al Shi Nai’an), kaj *Pilgrimo al la Okcidento* (Wu Cheng’en), kaj multaj aliaj verkoj klasikaj kaj modernaj. Li ankaŭ kuntradukis kaj kunredaktis la trivoluman *Ĉinan antologion* kaj aliajn antologiajn librojn, verkis vortarojn kaj lernolibrojn, aŭtoris multegajn artikolojn kaj recenzojn. Dum sia 40-jara laboro li tradukis por *El Popola Ĉinio* tekstojn kun ĉ. du milionoj da ideogramoj kaj poluris tradukojn kun kvar milionoj da ideogramoj.

Laŭlum estis membro de la Ŝtata Komisiono por Juĝo pri Kompetenteco de Superaj Tradukistoj. Pro sia ĵurnalisma agado ekde 1991 li ricevis specialan subvencion de la ĉina registaro. Li estis membro de la Akademio de Esperanto (1983–2009), honora membro de UEA (2004), honora prezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio, honora komitatano de la Ĉina Esperanto-Ligo. Laŭreato de la premioj de la Fondaĵo Grabowski (2003), de la Ĉina Tradukista Ligo (2010), de la Ĉina Esperanto-Ligo (2011) kaj de la premio de OSIEK pro la traduko de *Ĉe akvorando* (2011).

*Ni funebras kaj kondolencas.*

# Patric ekhantis en Esperanto!

*Vinilkosmo* anoncis pri eldono de nova albumo en Esperanto: *Okcitanio*.

Floréal Martorell (Flo), ĉefo de *Vinilkosmo*, nomis min unu el la “kulpantoj” pri la apero de la disko. Tio ĝojigas kaj timigas min samtempe. Ĝojigas pro tio, ke realiĝis mia delonga revo; timigas, ĉar eble la ideo pri tio, ke mem Patric, fama “trobadoro de Okcitanio”, kiel oni ofte nomas lin, kantu en Esperanto siajn kantojn, ŝajnos al iu “frenza”. Ja Patric neniam estis esperantisto, kaj miaj antaŭaj provoj kantigi lin en Esperanto estis malsukcesaj.

Ĉio ŝanĝiĝis pasintjare, kiam mi kaj Svetlana Smetanina, vicprezidanto de REU, partoprenis en IREM-11 (Interasocia Renkontiĝo de Esperantistoj de Mediteraneo), okazinta en aprilo 2011 en la sudfrancia urbo Seto (Sète).

Antaŭ la vojaĝo mi eldonis en Moskvo la kantan *Okcitanaj kantoj en Esperanto*, kun 17 kantoj de Patric kaj kelkaj tradiciaj okcitanaj kantoj, al kiuj Patric donis duan vivon en siaj albumoj. Pri tradukado de la kantoj el la okcitana kaj la franca lingvoj laboris pluraj personoj. Laŭvortajn tradukojn faris rusinoj Svetlana Smetanina, Maria Novikova, Tatjana Loskutova. La ĉefan rolon en tiu ĉi prepara parto ludis franca esperantisto André Andrieu, sen kies kompetenta



tradukado, redaktado kaj komento de la kantotekstoj apenaŭ realiĝis la projekto. Mia tasko estis poezie aranĝi la tradukaĵojn.

Por tiuj, kiu ne estas konataj kun la kantoj de Patric, mi klarigas, ke Patric estas pseŭdonomo de fama okcitana bardo, verkanta kaj plenumanta en la okcitana kaj la franca lingvoj siajn kantojn, kiuj aperis en 18 albumoj. Li koncertas ne nur en Francio, sed ankaŭ en ĉiuj mondopartoj.

La unuan fojon Patric aperis en Esperantujo en 1998, kiam li prezentis sian programon en la Nacia vespero de la 83a Universala Kongreso en Montpeliero. Li tiam kantis nur en la naciaj lingvoj, pro kio kongresano plendis en la *Kongresa Kuriero*: “Kio pleje ĝenis min, estis, ke mi nenion komprenis... Oni certe trovus homon,

kiu koncize povus redoni la enhavon...”

Kaj post pluraj jaroj mi neatendite por mi mem decidis “reagi al la plendo” per tradukado de kantoj de Patric. Unue, mi ekde la unua aŭdo estis ravita pro la magiaj melodioj de la kantoj de Patric, kaj tiu amo restis en mia animo por la tuta vivo; due, danke al Interreto mi ekhavis eblecon akiri multajn albumojn de Patric kaj ricevi kune kun la diskoj la tekstojn de la kantoj. Tiel aperis ideo pri kantararo en Esperanto.

Kaj nur en Seto, kie mi konatiĝis kun Patric (li koncertis en IREM-11, kaj JoMo interpretis kelkajn kantojn por la publiko kaj plenumis du kantojn de Patric en Esperanto), aperis ideo pri albumo de Patric en Esperanto. Tiun ĉi ideon subtenis Flo kaj JoMo (Jean-Marc Leclercq). Estis ili, kiuj sukcesis konvinki Patric-on kanti en Esperanto por la albumo *Okcitanio*. Krom Patric en la projekto partoprenis grupo de sudfranciaj esperantistoj, organizita de JoMo kiel koruso. Ili kantis kun Patric en tradiciaj popolaj okcitanaj kantoj.

La albumo ĵus aperis. Nun aperis ebleco konatiĝi kun fragmentoj de la registraĵoj kaj mendi la diskon ĉe *Vinilkosmo*

Diskoservo: <http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkdd113&lng=e>

Elŝutejo (mp3 kaj ogg): [http://www.vinilkosmo-mp3.com/patric-c-76\\_198.html](http://www.vinilkosmo-mp3.com/patric-c-76_198.html)

Elŝutejo (senperda formato flac): <http://cd1d.com/fr/album/okcitanio>

Ludmila Novikova

---

## Promeskampanjo de *Vinilkosmo*

*Vinilkosmo* lanĉas kampanjon por esplori pli aktivan, partoprenigan kaj sukcesan manieron por produkti kaj eldoni novajn diskojn de Esperantoartistoj, kaj invitas la muzikŝatantojn rekte helpi por decidi kiuj diskoprojektoj estu produktitaj kaj eldonitaj.

Por malkovri pli pri la “Promeskampanjo” legu pli kaj eventuale kontribuu, en ĉi tiu ligo: <http://goo.gl/5pvMO>

---



## Belartaj konkursoj de UEA 2013

La gvida Esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA, invitas partoprenantojn por la 64a fojo. La rezultojn oni anoncos en la 98a Universala Kongreso en Rejkjaviko. Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al partopreno en la UK, nek al membreco en UEA. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, escepte de la branĉo infanlibroj. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Validas krome la jenaj kondiĉoj:

Poezio: maksimuma longo ne fiksita.

Prozo: maksimuma longo 200×65 karaktroj (kvino da paĝoj).

Teatraĵoj: maksimuma longo ne fiksita.

Eseo: teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo, proksimuma longo 400×65 karaktroj (deko da paĝoj); la unua premio nomiĝas "Luigi Minnaja".

Infanlibro de la Jaro: originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2012. Unu premio.

Ĉiujn konkursaĵojn en la branĉoj Poezio, Prozo, Teatraĵo kaj Eseo oni devas sendi en unu papera ekzemplero al: Belartaj Konkursoj de UEA, ĉe Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio, aŭ prefere en elektronika formo al la adreso: [michela.lipari@tiscali.it](mailto:michela.lipari@tiscali.it), indikante la elektitan pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro. La absoluta limdato por ricevo de konkursaĵoj estas la 31a de marto 2013.

Por la branĉo Infanlibro oni devas sendi kvar ekzemplerojn de la koncerna libro al la ĉi-supra adreso de s-ino Lipari, sekretario de la Belartaj Konkursoj.

Premioj: unua premio 250 eŭroj, dua premio 175 eŭroj, tria premio 100 eŭroj; nova talento 175 eŭroj; infanlibro de la jaro 525 eŭroj.

Laŭ decido de la Komitato de UEA la Belartaj Konkursoj ne plu havas la branĉojn pri filmoj kaj kantoj. Anstataŭe okazos festivalo de filmoj kaj festivalo de kantoj en gravaj estontaj aranĝoj de UEA/TEJO.

Detala regularo haveblas ĉe UEA, kaj legeblas ankaŭ en la [retejo de UEA](#).

## Ricevitaj libroj

Banet-Fornalowa, Zofia. *Omaĝe al Aleksandro Silberniki*. — Warszawa, Łódź: Zofia Banet-Fornalowa, 2011. — 40 p., il. — [Donaco de Robert Kamiński].

*Min trafis feliĉ' esti rusa poeto* (Poetoj juddevenaj en la rusa poezio de la 20-a jarcento) / Kompilis, tradukis el la rusa Mikaelo Bronŝtejn. — M.: Impeto, 2012. — 80 p.; 300 ekz. — [Aĉeto].

*Pri homoj kaj verkoj*: Eseoj pri la Esperanto-kulturo / Redaktis Michela Lipari, Humphrey Tonkin; Enkonduko de Humphrey Tonkin; Postparolo de Nicola Minnaja. — Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2012. — 143 p. — [Recenzo-ekzemplero].

Steele, Trevor. *Flugi kun kakatuoj*: Romano. — Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 2010. — 256 p. — [Recenzoekzemplero].

Żelazny, Walter. *Ludwik Zamenhof: Życie i dzieło. Recepcja i reminiscencje. Wybór pism i listów*. — Kraków: Nomos, 2012. — 292 s. — [Donaco de Walter Żelazny].

## Ricevitaj gazetoj

EAB Update, 2012/59; Esperanta Finnlando, 2012/4; Esperanto, 2012/10; Femina, 2012/30; Heroldo de Esperanto, 2012/7,10; Informilo por Interlingvistoj, 2012/3; Internaciisto, 2012/110; Kontakto, 2012/4; La Ondo de Esperanto, 2012/11; La Revuo Orienta, 2012/10; Le Monde de l'Espéranto, 2012/582; Literatura Foiro, 2012/257,258; Monato, 2012/10; REGo, 2012/5; Scienco kaj Kulturo, 2012/3,4; Verda Saksofono, 2012/2.

**La abontarifo  
de La Ondo de Esperanto en 2013  
denove restas la sama. Tuj (re)abonu!**

## Literatura Foiro, 2012, №257

**Uverture** en la junia numero de 2012: *La florbranceto* de Hermann Hesse (en traduko de Christian Declerck).

**Datrevene**: Perla Martinelli pri Edmond Privat. Resumo de la bazo por kurso okaze de la 50-jariĝo de la forpaso de Privat.

**Originala literaturo**: Till Dahlenburg recenzas la libron *Beletra kolekto de Ĝenevaj aŭtoroj*, kiu enhavas verkojn de Mad Mevo, Henri Beupierre kaj Johán Valano. La revuo informas ke la PEN-premion La Verko de la Jaro 2011 gajnis *Kardo sur kasko* de Ivanička Maĝarova. Akompanas kompleta listo de ĉiuj libroj, kiuj ĝis nun ricevis la premion establitan en 1976.

**Albana literaturo**: Ismail Kadare pri la beletro de la malpermesita lingvo tra Bardhyl Selimi kaj recenzo de Josip Pleadin pri la libro *Hunda haŭto* de Fatos Kongoli en traduko de Tomasz Chmielik kaj Bardhyl Selimi.

**Lingvistiko**: Federico Gobbo pri Alan Turing, sed ne kiel patro de informadiko, pri Alan Turing kiel filozofo de lingvaĵo.

**Kino** (ankaŭ psikologio kaj feminismo): intervjuo de la mondfama aktorino Isabelle Huppert en traduko de Rolfo.

**El la redakcia arkivo**: La lasta eseo de Leen Deij, *Pri stratfutbalo kaj la daŭrigo*.

**Muziko**: Carlo Minnaja pri Lucio Dalla kaj lia kanzono *4an de marto 1943*.

**Datrevene**: Armando Zecchin okaze de la titolpaĝo de la ĵurnalo *Il Secolo* kun dato 17 aprilo 1912.

**Filozofio**: Carmel Mallia demandas "Kial? Kiel? Kiom?" por konkludi "Vivu la Filozofio!". Kaj eseo de Peter Bieri (en traduko de Horst Vogt) pri la esenco de klereco. **HeKo**

**Monato**  
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

**Sendependa internacia  
revuo en Esperanto kun  
legantoj en 65 landoj!**

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco  
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

[www.monato.net](http://www.monato.net)

Flandra Esperanto-Ligo  
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen  
[monato@fel.esperanto.be](mailto:monato@fel.esperanto.be)

**P**or la vortenigmo *Araneajo* (aŭgusto-septembro) venis dek unu respondoj. Ĉiuj estas ĝustaj. Ilin sendis: Edmund Grimley Evans (Britio), Jackie Huberdeau (Francio), Bruno Lehtinen (Finnlando), Pere Palà (Hispanio), Edeltraut Henning (Germanio), Dorota Burchardt, Zbigniew Tylkowski (Pollando), Klara Ilutovič, Maksim Kostromin, Vladimir Vyčegjanin (Ruslando), Roland Larsson (Svedio).

La libropremion kaj niajn gratulojn ricevas **Roland Larsson**.

La solvo: “Kia la kapo, tia la ĉapo”.

## Estona krucvorttenigmo

1	2			3	4		5		6		7		8	9
		10							11					
		12							13					
14			15								16			
		17				18			19					
20						21					22			
		23			24		25	26	27					
28											29			30
		31							32					
		33							34					
35				36								37		

Estona krucvorttenigmo estas analoga al la klasika, sed ĝia ĉelaro (preskaŭ) ne havas malplenajn ĉelojn. Ĉeloj, kiuj ne apartenas al la sama respondo, estas limigitaj per dika linio.

**Horizontale.** 1. Likva kombinaĵo de hidrogeno kaj oksigeno, el kiu konsistas pluvo, maroj, lagoj kaj riveroj; 3. Ŝtona skulptaĵo de mita besto en Egiptio; 7. Fluaĵo por skribi; 10. Rabobirdo kies voĉo similas miaŭno; 11. Besto kapabla dum minuto elfosi kavon kaj sin kaŝi en ĝin; 12. ... li meritis, tiel li profitis; 13. Voĉo aŭ blovinstrumento; 14. Eŭropa ĉefurbo kun monumento al viktimoj de birda gripo; 16. Antikvaj grekoj tre ŝatis ĉi tiun frukton. Ĝian kontrabandon oni konsideris ŝtatperfidio; 17. Besto, simbolo de malklera, malsaĝa homo; 19. Subporda trabo; 20. Spirebla nesimpla gaso ĉirkaŭanta Teron; 21. = La Eternulo; 22. Irvojo en ĝardeno aŭ parko inter du vicoj da arboj; 23. Ĉarma akva birdo, kiu kvakas, havas flavajn idojn; 26. Arbareto; 28. Loko kie mono estas pagata; 29. Rivero elfluanta el Volgo; 31. La ĉefurbo de Peruo; 32. = Taŭro; 33. Kreskaĵo, simbolo de hebrea geedziĝo; 34. Ŝtofo sur bilarda tablo; 35. Gutoj da akvo, kiuj dumnokte kondensiĝas sur vegetaĵoj kaj tero; 36. Loĝantoj de la “Eterna urbo”; 37. Dekora kuraca herbo el familio liliacoj.

**Vertikale.** 1. Nepra detalo de gotikaj konstruaĵoj; 2. = Stelaro; 4. Antaŭ mortigo de urso ne vendu ĝian ...; 5. Ĉiu elementa objekto de kono; 6. Longa armilo kun unu-tranĉa klingo; 8. Societo el pastroj aŭ monaĥ(in)oj; 9. Servanto de Mordoro ĉe Tolkien; 15. Gaso kreiganta en fulmotondraj nuboj; 16. Ioma kvanto da akvo sur tero, vojo; 18. Poezia ĝenro; 19. = Malsupren; 24. Popolano, simbolo de troa ŝparemo en ŝercioj; 25. Ebena sen elstaraĵoj; 27. Manko de lumo en loko, kiun korpo apartigas de la lumo; 28. Romia cifero; 30. Grasa likvaĵo.

Kompilis **Viktor Alikin**

La solvoj devas atingi la redakcion antaŭ la 10a de februaro 2013.

## Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

### Do ne kontu kiel ranoj

La rankonto estas modernigo de la bonkonata tragedio de Mefisto... (David Thornell. *Letero de nia Prezidanto // Bulteno de la Londona Esperanto-Klubo*, nov-dec 2012, p. 2)

### Manĝa vojo al la vero

Fine, ni elektis verpermanĝi en la Restoracio Highway 4... (Ade Maswan. *Manĝi en Hanojo // Esperanto en Indonezio*, 2012, № p. 5)

### Ĝusta ago per la flago

... pri la uzo de la flago: kiel ĝi kuŝu sur preziduma tablo...? kie ĝi staru apud la prezidumo...? okaze de entombigo, se oni kovras la ĉerkon per flago, ĉu la stelo situu je la dekstra piedo... aŭ ĉe la kapo dekstre...? (*En Afriko la parlamenta sesio 2013*, HeKo 517 7-C, 16 okt 2012, [esperantio.net/index.php?id=2039](http://esperantio.net/index.php?id=2039))

### Venos verda venĝo Varsovia

Poloj estas tre fiera nacio, kaj ne apartenas al iuj kiuj povas esti senpune ofendataj... tio neniam kaj nenie povas okazi sen treege gravaj konsekvencoj — kaj tio inkludas ankaŭ la Eo Movadon... Se iu furiozigas ilin, tiu devas (ne nur povas) kalkuli je la reago, pli aŭ malpli frue tre doloriga, tre senhezita kaj tre instrua, ĉiam tre serioza en la konsekvencoj. (Zbigniew Wybraniec. *Profesiuloj, amatoroj, kaj konsekvencoj de arroganteco*, [esperlando.net/uvl/2012/10/20/ekster-de-esperantismo-ekzistas-la-vivo](http://esperlando.net/uvl/2012/10/20/ekster-de-esperantismo-ekzistas-la-vivo))

### Martaj gruntoj

En la marta numero de la revuo Esperanto apris artikolo de Toon Witkam... (Vilhelmo Lutermano. *Nia “DIPLO”*; *ricevis premion*, [eo.mondediplo.com/article1880.html](http://eo.mondediplo.com/article1880.html); rimarkis Richard Schneller)

### La kurba akso

Universala Esperanto-Asocio estas pli kaj pli kuplita al la lastaj komunistaj bastionoj, laŭ akso de Hanojo al Havano, pasante tra Pekino. (*UEA firme kuplita al la lastaj komunistaj bastionoj*, HeKo 518 7-A, 2 nov 2012, [esperantio.net/index.php?id=2048](http://esperantio.net/index.php?id=2048))

### Komitatonoj, aŭ: Stranga matematiko

La duan eblecon elektis kvarono de la komitatanoj, dum la duan nur dekono. (Łukasz Żebrowski. *Rubriko de la prezidanto // Kontakto*, 2012, №3, p. 21; rimarkis Kalle Kniivilä)

### Tre penus PEN sen la Sen.

Sen. Giorgio Silfer estis specife kaj insiste invitita de la Hungara PEN por prelegi dum regiona konferenco fine de septembro en Budapeŝto. (*Septembro kun multaj delegacioj*, HeKo 514 4-B, 4 sep 2012, [esperantio.net/index.php?id=2009](http://esperantio.net/index.php?id=2009))

Plukis **István Ertl**

**Ne forgesu (re)aboni**

## Perantoj de “La Ondo de Esperanto”

**Argentino:** Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla – 52, CP 5507 – Vistalba, Luján de Cuyo – Mendoza

**Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg

**Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

**Belgio:** FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen

**Brazilo:** BEL, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-900 Brasília-DF

**Britio:** EAB/Viv O’Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE

**Bulgario:** Georgi Mihalkov, “Nadejda” V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia

**Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady

**Danlando:** Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø

**Estonio:** Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602

**Finnlando:** EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki

**Francio:** Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris

**Germanio:** Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Straße 9, DE-55129 Mainz

**Hispanio:** Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell

**Hungario:** HEA, Pf. 193, HU-1368 Budapest  
KEA, p.k. 87, HU-1675 Budapest

**Irlando:** Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

**Islando:** IEA, p.k. 1081, IS-121 Reykjavík

**Italio:** IEF, Via Viloresi 38, IT-20143 Milano  
Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 Trieste

**Japanio:** JEI, Waseda-mati 12-3 Sinzyuku-ku, Tōkyō-to, 162-0042

**Katalunio:** KEA, Apartat 1008, ES-08204 Sabadell

**Koreio:** KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703

**Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb

**Kroatio kaj Slovenio:** Višnja Branković (vd. Italio)

**Latvio:** Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga

**Litovio:** LEA, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C

**Meksiko:** Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos, Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero México D.F., CP 07969

**Nederlando:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

**Norvegio:** Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo

**Nov-Zelando:** G.David Dewar, 28 Coventry Way, Long Bay, North Shore City, NZ-0630

**Pollando:** PEA, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa

**Portugaliao:** PEA, Rua João Couto, 6, R/C-A, PT-1500 Lisboa

**Ruslando:** Galina Romanovna Goreckaja, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205

**Serbio:** Dimitrije Janičić, Svetogorska 19, 11000 Beograd

**Slovakio:** Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin

**Sud-Afriko:** Colin S. Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge 7441

**Svedio:** Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå

**Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen

**Usono:** ELNA, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530



**Francio.** Malofte okazas, ke aperas Esperanto-albumo de kantisto kun 18 albumoj nacilingvaj (vd. p. 20). Tia estas Patric, unu el la plej famaj okcitanaj kantistoj, kiu kantis, interalie, kun Brassens kaj Barbara, kaj kiun Tom Paxton agnoskis heredanto de la engaĝitaj kantistoj usonaj. (Flo / André Hampartzoumian)



**Germanio.** La 29an de oktobro, lunde, Floréal Martorell vekigis fama, ĉar la gazetaro de Aalen aperigis fotojn el la dimanĉa ceremonio en la urba biblioteko (vd. p. 3), en kiu li ricevis la 13an Esperanto-Kultupremion de la urbo Aalen / FAME pro la evoluigo de la Esperanto-muziko. (Françoise Eriksen)



**Ĉeĥio.** En la 6a Internacia kongreso de Asocio de handikapitaj esperantistoj (vd. p. 4) multajn aplaŭdojn kaj florbukedon ricevis la nelacigebla kunfondintino de la asocio Jarmila Rýznarová, kiu en siaj 83 jaroj denove transprenis la funkcion de asocia sekretario por la sekvaj kvin jaroj. (Petro Chrdle)

# HISTORIO

## DE ESPERANTO



Verkita de Aleksander Korĵenkov

Serio *Scio*. Volumo 5

Aleksander Korĵenkov. *Historio de Esperanto*  
Serio *Scio*, Volumo 5  
128 paĝoj, 12 eŭroj

# *Mi estas homo*



Originalaj verkoj de  
d-ro L.-L. Zamenhof

Serio *Scio*. Volumo 6

L.-L. Zamenhof. *Mi estas homo*  
Serio *Scio*, Volumo 6  
288 paĝoj, 24 eŭroj

# HOMARANO

La vivo, verkoj kaj ideoj  
de d-ro L.L. Zamenhof



Aleksander Korĵenkov

Serio *Scio*. Volumo 8

Aleksander Korĵenkov. *Homarano*  
Serio *Scio*, Volumo 8  
360 paĝoj, 27 eŭroj

*Aleksander Korĵenkov*



## ZAMENHOFOLOGIO

Aktualaj problemoj kaj taskoj

Aleksander Korĵenkov. *Zamenhofologio*  
Serio *Sed ne el katedro*, Volumo 5  
16 paĝoj, 3 eŭroj

*Mendu en via kutima libroservo*